

# ASISTILO

## n-ro 19

Aŭtuno 1996 Automne

Revue de religion comparée bilingue (espéranto et français) / Religi-kompara revuo  
Association Internationale d'Etude des Enseignements Spirituels et Théologiques

**ASISTI : Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj**

Neŭtrala asocio kunlaboranta kun TEL (Tutmonda Ekumena Ligo), JBLE (Japana Budhana Ligo Esperantista), EPA (Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto), ŬEA (korea Ŭon-budhisma Esperantista Asocio), OKEJ (Ortodoksa Klubo de Esperantaj Judoj), U.E.A. , WCRP (*World Conference on Religion and Peace*).  
Asociita membro de IARF (*International Association for Religious Freedom* / Internacia Asocio por Religia Libereco).



Desegnita de 8-jara lernanto de Erika Tóth



La sekretario kaj prezidanto  
ĉe **IARF-mondkongreso**,  
kun Ŭon-pastrino Bokin Kim

**Internacia lingvo preparolita ĉe UNO  
de la Ŭon-budhista Ĉefmajstro**  
(parolanta sub la korea flago dum E-kongreso)



## Vorto de la redaktoro

Grava evento por Esperanto preskaŭ nerimar-  
krite okazis lastan jaron ĉe la Novjorka sidejo de  
Unuiĝintaj Nacioj : s-ro LEE Kwangjeong, **Ĉef-  
majstro de Ŭon-budhismo alvokis** la regiulojn,  
kunlabore kun la Unuiĝintaj Nacioj, **adopti**, kiel  
**komunan lingvon** "*tian lingvon kia ne apartenas  
al iu nacio kaj tial estas akceptebla al ni ĉiuj*".  
(Li faris paroladon okaze de la 50-jara jubileo de  
la Unuiĝinta Naciaro, **enkadre de Monda Konfe-  
renco pri Religio kaj Paco**, al kiu ASISTI estas  
nuntempe aliĝanta).

Ni bonvenigas la **inviton de Jeremi Gishron**  
(*Centro Sivron*, Jerusalemo), ke ASISTI traspertu  
sian 4-an *Interreligian Seminarion Esperantistan  
en Israelo venontsomere*.

Ni varme invitas vin ĉiujn, kune kun la IARF-  
kongresintoj **subskribi la peticion** por la religia  
libereco en Tibeto, responde al la afabla mesaĝo  
de la Dalai-Lamao.

Kaj kiuj ne ŝatis la praesperantecan tradukon  
de la *Sercado de l'Sankta Gralo* ne plu timu legi...

N.B. **Bonvolu** laŭeble **sendi viajn artikolojn** ktp. en  
formo de dokumentoj en *Word.6* (aŭ kongruaj : *Word  
Perfect...*) sur disketoj (3 1/2), plie de la surpapera ku-  
tima formo : tiel mi ŝparos la enkomputiligan retajpadon.

Ligila Organo de ASISTI (Asocio de studado inter-  
nacia pri spiritaĵaj kaj teologiaj instruoj) ĉ. trimonata

Red. : Presbytere F-09800 Balagué (Tel 33 5 61 04 70 66).

ASISTI-estraro: Prez. Yosimi Umeda - Bradjo Moro :  
kasisto - Ch. Lavarenne : sekretario kaj vickasisto -  
Jeremi Gishron (Centro Sivron, Box 231 80, IL-91 231  
Jerusalem) : kunvenoj - F. Degoul : eksteraj rilatoj -  
Leif Nordenstorm : Religia Antologio (Landstings-  
vägen 9A, S-96176 Boden, Svedio. Tel. : 0921-12354).

Directeur de Publication : Christian Lavarenne

Jarabono : triono de UEA-individa abono (MA), t.e.  
100ff / 32gld / 29DM / 18\$ (duonprezo por malriĉaj l.) al :  
- franca poŝtkonto *Asistilo*, n-ro 1042177R Marseille  
- UEA-konto asis-r  
- FEL-konto clvr-n  
- Marek Krainski, ul. Albanska 28/2, PL-60 134 Poznan  
- aŭ B. Moro, Srytka 147, PL-47-220 Kedzierzyn-Kozle

Subtena abono : ekde 150 ff / 50 gld / 50 DM / 30 \$ . . .

Abonhelpa fonduso : pliaj abonoj laŭ la tarifo valida  
por vi mem ; vi rajtas indiki la adresojn de la ricevontoj...

ASISTI-kotizo 1997 : deviga por esti membro, kiu  
ajn ĝi estu (sed minimume kvarono de la UEA-MJ :  
9,5gld, por okcident-Eŭropo, norda Ameriko, Japanio)


Subtena membro : ekde 200ff / 70 gld / 70 DM / 40\$

...Ne forgesu kontribui, koran dankon !

## Enhavo

Antaŭ 100 jaroj naskiĝis Mâ Ānandamayî (Hindio)	p. 3
Someraj raportoj (Praga UK kaj IARF-mondkongreso en Iksan, Koreio)	p. 4
Mesaĝo, de la Dalai-Lamao	p. 5
ASISTI-a peticio ĉe IARF-mondkongreso pri religia libereco en Tibeto	p. 5
Interreligia kunlaboro por la konstruo de monda Komunumo, de LEE Kwangjeong	p. 6
Jogosutro de Patanĝali, kun komentarioj de Vjaso kaj Mircea Eliade (R)	p. 8
Pinokjo kaj teologio, de A. Zecchin kaj L. Mantaut (I)	p. 15
Ĉu teologie pravigeblas <b>supereco de iu religio</b> super la aliaj, de B. Westerhoff (D)	p. 16
Distingiloj kaj esenco de profeteco (Religia-kompara studo), de M. Sturm-Berger (D)	p. 17
<i>La Sercado de l' Gralo</i> : Percevalo kaj la enermitino (romanika romano el la XIII-a jc)	p. 18
<b>Leteroj de legantoj</b> : Germain Pirlot (B) kaj Daniel Pfeiffer (D)	p. 22
<i>La Serio pri Giglgameŝ</i> : Dua tabuleto (Nineva kaj Malnova versioj, el la II-a jarmilo a.K.)	p. 23
Religia vivo de japanoj : mikspoto kaj paradizo de religioj, prelego de Y. Umeda (J)	p. 24
Nathan Söderblom, de Lydia Kerremans (B)	p. 26
<b>Recenzo</b> : <i>Adolesko</i> de Blazio Vaha (H)	p. 28
Kelkaj kritikaj notoj pri <i>Bruno Gröning</i> , de Z. M. Sikosek (D)	p. 28
<b>Leteroj de legantoj</b> : Ulrich Matthias (D), Enrico Marzola (I), Jebumo (Ĉinio), Jean Bertrand (F) kaj Jeremi Gishron (Jerusalemo)	p. 29
<b>Oficiala invito de Centro Sivron al ASISTI, kongresi en Israelo</b>	p. 29
Paĝo sub la respondeco de <i>Centro Sivron</i> (Israelo)	p. 30
Anoncoj : <i>La japana budhano</i> ; kaj <i>Nuntempaj spiritaĵaj mesaĝoj</i> de F. Degoul (F)	p. 31
<i>Konvencio pri civilaj kaj politikaj rajtoj</i> : Komentario de UNa Homrajta Komitato	p. 32

## Antaŭ 100 jaroj naskiĝis Ma Anandamaji



" Simple voku Dion per la nomo kiun vi preferas.  
Ĉe la taŭga momento Li diros al vi Sian Veran Nomon."

"En la meditado fari kaj esti estas tiel malsamaj !  
Oni provas meditati, oni faras meditadon ; sed la tagon  
kiam la meditado emanis de ni, kiam ĝi estas, kia alia mondo !"

Ricevinte viŝnuistan edukon, tamen ŝi tute egale instruis la fidelulojn de la multnombraj hinduaj branĉoj, la islamanojn, la budhistojn kaj la kristanojn. **Al ĉiu ŝi transdonis la internan sperton** kiu ebligas kaj relativigi sian propran tradicion kaj ĝin plene laŭvivi. Neniam ŝi sugestis forlason de tiu aŭ alia tradicio, kvankam ŝi situis en tia loko kia entenas ilin ĉiujn.

Jean-Claude Marol, ekzemple, iam aŭdis ŝin diri pri Kristo :  
"Li estas Lumo ; Lumo kiu donas lumon al ĉio."

### Ŝia vivo

*Ma\** Anandamaji naskiĝis en 1896 en Kheora (nuntempe en Bangladeŝo) kun la nomo Nirmalâ Sundarî Devî. Ŝiaj gepatroj estis Viŝnuistaj brahmanoj. Sed ŝi estis la amikino de ĉiuj, hinduoj kaj islamanoj. Okazis ke ŝi spontanee enekstaziĝis aŭ dronis en *samadhi*. En 1909 ŝi estis edzinigata kun Bholnath, kiu ne sekskuniĝis kun ŝi sed fariĝis ŝia disĉiplo. Sen guro kaj sen sciado de la Skriboj ŝi intuicie praktikis ĉiajn tradiciajn asketaĵojn. B. Mukerĝi ekzemple atestas : "Kelkfoje ŝia korpo fariĝis tiel malpeza kiel plumo kaj leviĝis super la teron, aŭ male fariĝis tiel nemovebla kiel roko. Multaj homoj povis poste observi tiujn du statojn." Kaj, laŭdire, estis tempoj en ŝia vivo dum kiuj ŝi manĝis nur po tri rizgrajnojn tage.

Post trijara silentado *Ma* komencis en 1925 preskaŭ kompletan fastadon dum pluraj monatoj, kaj ekigis "**nomadisman**" vivon : ekde tiam ŝi pasis nur kelkajn tagojn, aŭ kelkfoje semajnojn, tie aŭ tie ĉi. En 1929 ŝia disĉiplo Bhai-ĝi fondis la unuan el dudeko da aŝramoj, por ŝi nuraj haltejoj en ŝiaj senĉesaj vojaĝoj tra tuta Hindio.

Ĝis iu vespero, de la 27-a de aŭgusto 1982, kiam ŝi ĉesis paŝi sur la hinda tero.

### Taksado kaj atestoj

Arnaud Desjardins, kiu verkis multajn altnivelajn librojn pri azia spiritualeco, skribas :

"Tiu virino, kies vivo konsistis el nur vojaĝado kaj estado, kiu nenion skribis, nenion deziris kaj nenion serĉis, probable estas en Hindio la plej fama kaj la plej respektigata el ĉiuj grandaj nuntempaj Saĝuloj. Multaj eĉ rigardas ŝin kiel unu el la plej altaj personecoj en la tuta historio de la hindua spiritualeco, kvankam en ĝi ili ne mankas."

Li ankaŭ rakontas : "Neniu baro inter ŝi kaj ni, nur intimeco kaj familiareco. *Mother* kun ĉiu sammaniere kondukis, plena je tenereco kaj kormalfermiteco, tiel natura, tiel simpla. La tuta etoso estis farita el amikeco kaj ĝojo.

Kaj tiun vesperon ni sidas ĉirkaŭ ŝi sur eta teraso kiu superstaras vastan pejzaĝon de ebenajoj kaj montetoj. En la foro la rivero desegnas sian rubandon, brila ĉe la malleviganta suno. Ĉio estas amo kaj kvieto. En la silento unu el la disĉiploj mallaŭte legas. *Ma* nenion diras. Ni nenion diras. Ŝi rigardas nin. Ni rigardas ŝin. Kaj dum, kun la nokto, descendas sur nin la Paco kiu superas ĉian komprenon, ni vidas brili en ŝiaj okuloj la lumon de la vera Vivo, la anoncon ke la vekigo povas veni eltiri nin el nia mondo de spirita dormado."

Ŝri Ĝjotiŝ Ĉandra Raj rakontas : " Mi frumatene alvenis. La pordo de *Ma* estis fermita. Mi sidiĝis fronte al ĝi, dekon da metroj for. La pordo subite malfermiĝis. **Diino prilumis la ĉambron**, brila kiel la leviĝanta suno. En unu momento *Ma* resorbis tiun dian brilegon kaj reaspektis normala. En unu secundo la magia efekto foriĝis, mi estis transportita en la mirindan mondon. Mi tiam ekkonsciis ke *Ma*, responde al mia demando, rivelis sin. "*Vi volas vidi, do rigardu kiu mi estas...*". "

La sama ankaŭ rakontas : " Iam, virino kies filo mortis, falis ĉe la piedojn de *Ma*, lamentante. *Mata-ĝi* ekĝemadis kaj ekverŝis larmojn tiel abundajn, kaj ekbrakumis la patrinon tiel forte ke tiu ĉi forgesis ĉiujn siajn malfeliĉaĵojn ! Eĉ, ŝi sentis sin tiom koncernita de la larmoj de *Ma*, ke ŝi ekkrietis : "*Ma, rekonsciiĝu, de nun mi ĉesos priplori la morton de mia filo*". "

\* Mallongigo de *Mâtâ* : Patrino aŭ *Mâtâ-ĝi* : Panjo.

# Someraj raportoj

## IRKE-kunsidoj

"Integreco de la sano fizika, psika kaj spirita" estis la temo de la Praga **Inter-Religia Kunveno Esperantista** (IRKE). Senrilate kun la UEA-akcepto de la *Amikaro Bruno Gröning*, kiel faka kunlaboranta asocio, kvar prelegantoj prezentis siajn kontribuojn, el tre diversaj vidpunktoj :

"*Taoismo kaj la serĉado de la long-viveco*", de Bradio Moro, prezidanto de UTSLE\* ; "*Regenerado korpa kaj spirita*", laŭ kolombia majstro, de Philippe Chavignon ; "*Jogo kaj sano*" de Christian Lavarenne ; kaj "*Sano kiel spirita tasko kaj malsano kiel la vojo*", de Pavla Dvoráková, organizantino de la IRKE.

Ĉe la du unuaj prelegoj bedaŭrinde ĉeestis nur apenaŭ trideko da homoj pro manko de taŭga salono kaj informoj en la kongresa libro ; al la du lastaj, taŭge anoncitaj, venis preskaŭ centó da atentaj aŭskultantoj. Fine, malgraŭ tempomanko por detala diskutado, Gaby Tréanton mallonge prezentis "*Paco en ŝtormo*"\*\* de Marc Rohrbach (ĵus mortinta fondinto de Movado JEAN).

\* *Universala Tao-Stud-Ligo Esperantista* (Skrytka 147, PL-47-220 Kedzierzyn-Kozle, Pollando).

\*\* Mendebila ĉe ŝi : 25 r de l'Eglise F-St Quay-Perros

## ASISTI-kunveno

Preskaŭ 70 homoj ĉeestis la jarkunvenon de ASISTI, ĉefe por informiĝi pri ĝiaj celoj kaj atingoj. (**Ĝi nun oficiale petas membriĝon al WCRP, Monda Konferenco pri Religio kaj Paco**). ASISTI provas eldonigi esperantan tradukon (de s-ro Gunnar Gällmo, kiu ĉeestis) de la palia budhisma klasikaĵo "*Dhammapada*" (t.e. Dharmo-pado). Se la fama *Pali Text Society* finfine rifuzos [kio intertempe okazis], tiu grava teksto probable estos publikigata en la *Serio "Oriento-Okcidento"* de UEA.

Reelektiĝis kiel prezidanto s-ro Yosimi UMEDA (iama UEA-vicprezidanto), kaj kiel sekretario d-ro Christian Lavarenne (redaktoro de *Asistilo*), ambaŭ per 18 voĉoj de plenrajtaj membroj, unu sindeteno kaj neniu kontraŭa voĉo.

## Komuna silentado

Refreŝiga estis la duonhora silentado, provita dum la Valencia UK. La 40 partoprenintoj proponis ke estonte malgranda ĉambro estu tutkongrese rezervita kiel oazo de silento mezè de la kongresa tumulto, plie de pli granda ĉambro unuhore uzota por la nun preskaŭ tradicia komuna silentado.



## IARF-monda kongreso

La ĵus reelektitaj ASISTI-prezidanto kaj sekretario partoprenis en la 29-a monda kongreso de la **Internacia Asocio por Religio Libereco**. Ĝi okazis de la 2-a ĝis 8-a de aŭgusto en Iksan, ĉe la Universitato Wonkwang. Tiu ĉi, fondita antaŭ ekzakte 50 jaroj de Ŭon-Budhismo estas unu el la kvin famaj universitatoj en Koreio ; kaj tiu korea, preskaŭ sinkretisma branĉo de budhismo, fondita en 1916, havas milionojn da kredantoj kaj pli ol 600 templojn, inkluzive tridekon ekster Koreio : en Germanio, Japanio, Kanado, Usono, ktp.


La programo estis densega, kun ĉiutage du prelegetoj ĉe studgrupoj (la sekretario partoprenis en tiu pri "**Religio kaj kulturo**") ; du komunaj prelegoj (la plej impresa estis tiu de s-rino Dahlia Landau, izraela judino kiu, kiam ŝi eksciis, dediĉis al **arab-juda dialogo "sian" domon** ...fakte fie "konkerita" dum la naskiĝa milito de Izraelio); babila rondo ; "laborejo" ; devotado ; kultura vespero ktp. Ni esperas prezenti kelkajn el ĝiaj eroj en venonta numero.

Plie de intensa agado pri la peticio favore al Tibeto, kiun vi estas **ĉiuj invitataj subskribi** (vidu ĉi-apude), la prezidanto kaj sekretario kune renkontis i.a. la prezidanton de la universitato, la ĝeneralan sekretarion de WCRP por antaŭenigi nian aliĝpeton, kaj plej grave la ĉefmajstron mem de Ŭon-budhismo : ni ricevis tiun apartan honoron pro la fakto ke ni estas religiaj esperantistoj kaj li varme kuraĝigis nin daŭrigi nian agadon.

Ĉio finiĝis per kortuŝa porpaca preĝado ĉe la landlimo inter norda kaj suda partoj de Koreio.

Post la kongreso la sekretario estis invitita de la koreaj samideanoj resti unu semajnon en Seulo kaj ties ĉirkaŭaĵo, kun perfekta kunordigo de s-ro Jung-Kee LEE\*. Koran dankon al ĉiuj pro ilia afabla akcepto, ĉefe al la tiel simpatiaj gastigantoj !

\* La dua de dekstre sur la titolpaĝa malsupra foto.



### Mesaĝo de la Dalai-Lamao

*Responde al peto de la prezidanto de la Kunaordiga Konsilio de IARF por Suda Azio, s-ro S.S. Chakraborty, la Dalai-Lamao sendis jenan leteron laŭtleĝitan dum la malferma ceremonio :*

La 10-an de junio 1996

Mi estas ĝoja ekscii ke la 29-a Kongreso de la Internacia Asocio por Religia Libereco estas okazonta en Seulo de la 2-a ĝis 8-a de aŭgusto 1996.

Ĉi-okaze mi sendas miajn salutojn al la organizantoj kaj partoprenantoj, kaj bondeziras al via kongreso kompletan sukceson.

Homoj havas **denaskan deziron pri libereco kaj demokratio**. La ekapero de "popol-povo"-movadoj nediskuteble montris ke la homa raso ne plu toleras forprenon de sia libereco.

Senkonsidere ĉu oni estas riĉa aŭ ne, edukita aŭ ne, apartenanta al iu nacio aŭ alia, al iu religio aŭ alia, partiano de tiu aŭ tiu ĉi ideologio, ĉe la fundamenta nivelo ni ĉiuj estas la samaj homaj estaĵoj. Ĉiu el ni deziras feliĉon kaj ne volas suferi. Plie, **ĉiu el ni havas egalan rajton** strebi al tiuj celoj.

Kiel membroj de diversaj religiaj tradicioj, ni devas zorge konservi la religian liberecon kiun ni ĝuas. Ni devas subteni tiujn kiuj estas senigitaj je sia religia libereco kaj devas paroli favore al paco kaj justeco instruante la valoron kaj gravecon de la homa digno. Ni devas meti la fundamenton por starigi kaj daŭrigi rilatojn inter individuoj kaj popoloj, kaj montri ke ni povas loĝi sur la Tero kun sento de respekto kaj harmonio. Super ĉio ni devas kuraĝigi konduton plenan je kompatato, saĝo, toleremo kaj amo, kaj tiel inspiri al aliaj elekti vojon de respondeco, libereco, demokratio kaj paco.

La ASISTI-sekretario kontaktiĝis kun juna ladakha budhisto, Lobzang Tsultim Visuddha, kiu aprobis lian unuan version de rezolucio. Poste li vidis kongresanon kun To-ĉemizo "Free Tibet" (Liberigu Tibeton), unitarianan kanadanon, kiu multe helpis ilin ĉar li bone konis la procedurojn de IARF. Kun kelkaj aliaj ili tamen ne sukcesis prezentigi la proponon al la Ĝenerala Kunveno ; sed la ASISTI-sekretario ricevis kvin minutojn por pritrakti la temon en 70-homa stud-grupo ; kaj ŝanĝis ĝin en peticion, kiun pli ol cent partoprenantoj individue subskribis, el kiuj la IARF-Ĝenerala Sekretario Robert Traer, s-ro Chakraborty, Bhikkhu Sanghasena (*Executive President, Maha Bodhi Society*), ktp.

### Deklaro pri religia libereco en Tibeto

Ni, la subskribintaj partoprenintoj en la 29-a Monda Kongreso de la Internacia Asocio por Religia Libereco (IARF), kunvenintaj en Iksan (Sud-Koreio) de la 2-a ĝis 8-a de aŭgusto 1996 ,

profunde afliktitaj de la morto de almenaŭ 4 monaĥoj en majo kaj julio 1996, du el ili pafigitaj kiam ili provis malhelpi la forigon, el ilia templo ĉe la monaĥejo Ganden, de fotoj de ilia spirita gvidanto Lia Sankta moŝto la Dalai-Lamao (la tria, **Kunsang Thuktop**, 49-jara monaĥo de la monaĥejo Drepung, **mortis en Lhasaa prizono Drapĉhi** la 5-an de julio, kiel rezulto de mistraktoj **post sesjara mallibereco pro traduko en la tibeta de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj** ) ,

grave koncernitaj de raportoj pri la forrabo de 6-jara tibeta knabo, **Gedün Ĉhökji Njima**, kaj de liaj gepatroj, fare de la ĉinaj aŭtoritatoj mallonge post kiam li estis **rekonita kiel la lasta reenkar-niĝo de la dua plej grava gvidanto de Tibeto**, la Panĉhen-Lamao, kiu mortis en 1989 ,


kaj de raportoj pri la **respekteginda Ĉadrel Rinpoĉhe**, mankanta Abato de la monaĥejo Taŝilumpo ekde la 18-a de junio 1995, kiu estis forkondukita al nekonata loko en Siĉuan, kaj pri 48 monaĥoj de la sama monaĥejo kaj laikoj proksime rilatintaj kun la forpasinta **Panĉhen-Lamao**, kiuj estas malliberigitaj jam de pli ol unu jaro ,

kondamnante la provon de la ĉinaj aŭtoritatoj detruigi la tibetan identecon i.a. per religia kaj kultura persekutado, aparte per la malpermeso de fotoj de ilia spirita gvidanto Lia Sankta moŝto la Dalai-Lamao en la temploj kaj privataj domoj en Lhasao, kaj la malpermeso lerneje surhavi siajn tradiciajn kol-ŝnuretojn nomitajn *sungdu*, kiuj estas nuraj signoj de la benoj de iliaj lamaoj ,

1. petas la ĉinajn aŭtoritatojn certigi ke **Gedün Ĉhökji Njima** kaj lia familio, la Respekteginda Ĉadrel Rinpoĉhe kaj liaj monaĥoj, estos tuj liberigitaj kaj alpermesataj reiri respektive al sia vilaĝo aŭ al sia monaĥejo ;

2. petas la ĉinan registaron, ke ĝi ĉesigu siajn agojn de atenco kontraŭ la homrajtoj, zorgu pri la respekto al la fundamentaj rajtoj de la popoloj kaj individuoj en Tibeto, aparte **iliaj religiaj rajtoj kulti kaj manifesti sian religian identecon** ;

3. esprimas sian subtenon al ĉiuj tibetaj budhistoj, kaj esperas ke ili havos kiel eble plej baldaŭ **la eblecon libere praktiki sian religion**, kiel tio estas ilia necedebla rajto laŭ la *Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj* kaj aliaj internaciaj Konvencioj, subskribitaj de la ĉina registaro.



# Interreligia kunlaboro por la

Teksto de prelego\* farita en la kvara konferencejo de la novjorka sidejo de UNO, la 22-an de septembro 1995, kadre de *Monda Konferenco pri Religio kaj Paco* memore al la 50-jara **jubileo de Unuiĝintaj Nacioj**. La ĉefmajstro Lee Kwangjeong, **plej alta gvidanto de Uon-budhismo** (branĉo fondita en 1916 en Koreio, kun milonoj da kredantoj), **klare aludis al Esperanto**, kiun li eklernis.

Estimataj gefratoj, mi tre ĝojas saluti vin.

Mi estas Lee Kwang-jeong, la ĉefmajstro de Uon-budhismo, el Koreio. Mi volonte akceptis vian inviton por aldoni iom da saĝo al via laboro por konstrui mondan komunumon. Mi deziras diri kelkajn vortojn teme pri "Interreligia kunlaboro por la konstruo de monda Komunumo".

Homoj evoluigis sciencon kaj teknikon por produkti oportunajn ilojn kaj aparatojn necesajn por sia vivo. Scienco kaj tekniko kontentigis iu-grade la senfinajn materiajn dezirojn de la homoj. Des pli danke al okulfrapa evoluo de rimedoj veturaj kaj komunikaj, jam realiĝis monda komunumo en ekstera vivkondiĉo. Malfeliĉe, tamen, la spirita civilizo de la homaro ne sukcesis kontentigi la bezonojn de tia monda komunumo, nek konformiĝis al la abundo kaj prospero de materio. Tial la nuna mondo suferas grandan mizeron kaj nepriskribeblan doloron.

Ĉu al ni plaĉas aŭ ne, ni estas destinitaj kunvivi en komuna societo kun aliaj homoj kiuj havas malsamajn kredojn, lingvojn, haŭtkolorojn kaj kulturajn fonojn. Plue, ni devas strebi kaj trovi komunan prosperon en kompleta harmonio ankaŭ kun ĉiu natura medio. Hodiaŭ neniu neus la fakton ke **la tuta homaro havas la saman sorton**.

Tamen, konstrui mondan komunumon sen forigi konflikton kaj malamikecon inter diferencaj rasoj, nacioj kaj religioj estas same absurde kiel devige kunloĝigi en la sama domo familianojn kiuj dise loĝas en malharmonio kaj malpaco inter si. Se ili malkune loĝas, ne estiĝos konflikto nek batalo inter ili. Sed kia malfeliĉo estas, se ili malpacas kunloĝante ene de la sama dombarilo kaj kunmanĝante rizon el la sama kaldrono? La nuna mondo estas kvazaŭ ĉi tiu malfeliĉa familio plena je konflikto kaj malamo. Pri ĉi tio kulpas la spirita malriĉeco kaj nescio de homoj.

Rilate al tio, ja gravegas la misio kaj respondecado de ni religiuloj, kiuj devas gvidi la spiriton de la homaro. **Ni religiuloj devus unuiĝi** kaj elimini ĉi tian malpacon, por ke ĉiuj homoj de la mondo larĝe malfermu sian menson. Por fari tion multas aferoj kiujn ni religiuloj devas kunlabore fari.

Profitante la hodiaŭan okazon, mi volas mencii **kelkajn el tiuj multaj farendaĵoj**.

Unue, la homaro devas konscii ke ni ĉiuj estas membroj de unu familio kunloĝanta en la sama domo. **La fondinto de Uon-budhismo, Sotesan**, kaj lia posteulo Chongsan, **diris** :

*"La mondo estas unu granda domo sub la sama tegmento kaj ĉiuj homoj estas membroj de la sama familio. Ni tial helpu kaj amu nin reciproke kaj kunvivu en paco"*.

Alivorte ili instruis al ni ke ni devas interkompreniĝi, kunlabori kaj harmonie kunvivi malgraŭ diferencoj de raso, nacieco, kulturo, religio, vivregiono, ideologio aŭ eĉ natura medio. Ni nomas *ilŭonismo* tiujn instruojn de Sotesan kaj Chongsan.

Mi volas diri ke por havi tian sintenon, ni religiuloj devas pligrandigi nian timrespekton al unusola Dio ĝis ĝi inkluzivos ĉiujn sent-povulojn kaj eĉ ĉiujn estaĵojn. Ne eblas konstrui mondan komunumon sur ĉi tiu tero se oni (kvazaŭ embarasite) timrespektas nur unusolan Dion kaj malprudente traktas kaj rigardas kiel objekton de detruo ordinarajn estaĵojn, aliajn naciojn aŭ aliajn religiojn. Tial ni pligrandigu tian timrespekton al Dio ĝis al ĉiuj homoj, religioj, gentoj kaj estaĵoj. Samtempe ni devas igi nian interhoman rilaton reciproke bonfara kaj trovi malegoismon anstataŭ egoismon. Ne nur individua sed ankaŭ **grupa egoismo** alportas al ni nekalkuleblan malfeliĉon per konflikto kaj antagonismo. Do de ni malproksimos la idealo konstrui mondan komunumon kaj ne eblos realiĝi vera paco en ĉi tiu mondo se ni malestimas, distancigas kaj klopodas detruu iun difinitan klason, aŭ aliulon.

Ni konsciu ke malgraŭ diferencoj de loĝloko, haŭtkoloro kaj lingvo, **ĉiuj homoj estas anoj de unu familio** kunloĝanta en granda domo nomata la tero, kaj ke malgraŭ diferencaj esprimoj aŭ manieroj pri la pleja vero, ĉiuj religioj sin bazas sur la sama principo. Respekti sin reciproke kvazaŭ Dion aŭ Budhon kaj trakti ĉiujn homojn aŭ estaĵojn kiel Budhon reenkarniĝintan, estas ĝuste la spirito de *ilŭonismo*, kiu povas esti fundamento por la konstruo de monda komunumo.

# konstruo de monda Komunumo

## Ne nur la religiuloj

Due, por konstrui mondan komunumon, ni devas kulturi la menson de homoj. La troa avido, kolero kaj malsaĝo de nia menso estas la plej granda malhelpo al la konstruo de monda komunumo. Neimageblas konstrui mondan komunumon sen granda rolo de nia menso. Ni devas al ĉiuj homoj de la mondo disvastigi la menskulturon, kiu ĝis nun estas limigita nur al religiuloj, por ke oni kreskigu bonfaremon, iluminiĝu pri sia origina naturo, kaj kulturu bonvolan, humilan kaj kompatan menson. Tio estas la unua paŝo por konstrui mondan komunumon.

Nia menso havas en si nek koloron nek sonon nek odoron nek guston, sed ĝi ja entenas profundajn principojn, senlimajn trezorojn kaj mirindajn kapablojn. Nia menso estas kiel kampo. Ju pli ni kultivas kampon, des pli grandan rikolton ni ricevas. Aliflanke, ju pli ni ĝin neglektas des pli malfekunda ĝi fariĝos. Do, ni devas ne lasi nian menson nekulturita, sed ĝin diligente gardi. La menso estas nemalhavenda kaj ni devas ĝin serĉi kaj plene konservi. Fakte, el la misuzo de la menso rezultas preskaŭ ĉiuj katastrofoj individuaj kaj naciaj kiuj okazas de loko al loko en la nuna mondo. Al la menso atribuiĝas la kaŭzoj de katastrofo kiaj malarĝa penso, nescio, malatento, avido kaj sennombraj aliaj negativaj faktoroj. Tial, nepras al ni ĉiuj kulturi la menson. Se ni reekhavas nian originan menson puran kiel tiu de Budho, kaj agas laŭ ĝi, ni povos esence venki la obstaklojn al la konstruo de monda komunumo.

Krom la supre menciitaj du, **troviĝas urgaj taskoj farendaj kunlabore kun la Unuiĝintaj Nacioj**. Ekzemple, ni devas konservi kaj protekti naturan medion por niaj postaj generacioj, kaj aboli nukleajn armilojn kiuj, se ne briditaj, kaŭzos mempereon de la homaro. Sufiĉis nur unufoje uzi nukleajn armilojn, kiam ni pro nescio malprudente faligis ilin en Hiroŝimon [kaj Nagazaki]. Neniu krom malsanulo povus uzi ilin en la estonteco. Oni devas scii la fakton ke terura katastrofo trafos unue la propran landon, se oni daŭrigos produkti ilin kaj ili hazarde eksplodos pro fajro aŭ misfaro. Tial ni devas aboli nukleajn armilojn.

Ni devas forigi ankaŭ absolutan malriĉecon porĉiame el ĉi tiu tero. Iuloke homoj diboĉegas pro troa riĉo, sed en ĉi tiu momento malsatmortas ĉiutage tridek kvin mil homoj. Por realigi mondan komunumon ni devas ne lasi niajn homfratojn malsatmortantaj. Ni do devas kunlabori por forigi ĉi tiun absolutan malriĉecon el la tero.

## [ Esperanto ]

**Krome, necesas adopti komunan lingvon** akcepteblan al ĉiuj homoj de la mondo kun malsamaj lingvaj fonoj. Lingva baro estas unuavica obstaklo al la konstruo de monda komunumo. Se ĝi disfalos, samtempe eliminiĝos la lasta obstaklo al tio. Iam ekzistantaj lingvoj estas nature formitaj kun la paso de la jaroj, tial ili estas tre komplikaj kaj iliaj logikeco, reguloj kaj principoj ne estas popularitaj. Se iu specifa nacia lingvo fariĝus komuna lingvo, aliaj nacioj ne povus akcepti tion. Tial ni devas alpreni kiel komunan lingvon nur tian lingvon kia ne apartenas al kiu ajn nacio kaj tial estas akceptebla al ni ĉiuj. Eĉ se ni nun komencas tiun laboron, ĝi realiĝos post tridek aŭ kvindek jaroj. Se ni prokrastas trakti ĉi tiun problemon pro alteniĝo al lingva privilegio, tio donos al niaj sekvaj generacioj nemezureblajn malfeliĉon kaj suferon. **Tial mi asertas ke ni devas alpreni komunan mondlingvon.**

## Unuiĝintaj Religioj

Antaŭ proksimume tridek jaroj la mastro Tesan, mia gvidanto, proponis organizi *Unuiĝintajn Religiojn* kiel rimedon por solvi la problemojn supre menciitajn. Li forte rekomendis ke diversaj religioj de la mondo, kiuj devas gvidi la spiritan vivon de la homaro, unuiĝu kaj kontribuu al la konstruo de monda komunumo. Se religioj malpacas inter si kaj ekskluzive agas, la ekzist-neceso kaj gvidkapablo de religioj perdos brilon, kaj la mondo perdos esperon.

Samkiel diversaj nacioj kun malsamaj reĝimoj starigas politikan ordon kaj kontribuas al monda paco sub la standardo de la Unuiĝintaj Nacioj, diversaj religioj de la mondo sub la standardo de la *Unuiĝintaj Religioj* devas kunlabori reciproke, akordiĝi unu kun la alia, firme starigi la ordon de spirito kaj moralo, kontribui al la realigado de paca kaj feliĉa mondo, kaj doni esperon al la tuta homaro. Mi esperas ke jam ekzistantaj organizoj por interreligia kunlaboro, kiaj estas *Monda Konferenco pri Religio kaj Paco*, ludos decidan rolon por organizi la *Unuiĝintajn Religiojn* egale al la Unuiĝintaj Nacioj. Pere de ĉi tiuj Unuiĝintaj Religioj ni konstruu puran, brilan kaj varman paradizon en la tergloba vilaĝo. Mi pensas ke tio estas la plej urĝe farenda tasko de ni ĉiuj religiuloj.

Dankon.

**Ĉefmajstro LEE Kwangjeong**

\* Tradukita de CHOE Taesok kaj Joel Brozovsky, reproduktita kun afabla permeso, el *Oomoto* 438 p.9-11.

# Jogosutro de Patañjali :

परमाणुपरममहत्त्वान्तोऽस्य वशीकारः ।

क्षीणवृत्तेरभिजातस्येव मणेरग्रहीतृग्रहणग्राह्येषु तत्स्थतदञ्जनता समापत्तिः ।

तत्र शब्दार्थज्ञानविकल्पैः संकीर्णा सवितर्का समापत्तिः ।

स्मृतिपरिशुद्धौ स्वरूपशून्येवार्थमात्रनिर्भासा निर्वितर्का ।

paramânu-parama-mahattvânto'sja vaśi-kârah / [40]

kṣîna-vr(i)tter abhiġâtasjeva maner grahîtr(i)-grahana-grâhjeṣu tat-stha-tad-añġanatâ samâpattiḥ / [41]

tatra śabdârtha-ġñâna-vikalpâjḥ samkîrnâ sa-vitarkâ samâpattiḥ / [42]

smr(i)ti-pari-śuddhâũ sva-rûpa-śûnjevârtha-mâtra-nirbhâsâ nir-vitarkâ / [43]

परमाणुपरममहत्त्वान्तोऽस्य वशीकारः । सूक्ष्मे निविशमानस्य परात्परमाण्वन्तं स्थितिपदं लभत इति । स्थूले निविशमानस्य परममहत्त्वान्तं स्थितिपदं चित्तस्य । एवं तामुभयो कोटिमनुधावतो योऽस्याप्रतीघातः स परो वशीकारस्तद्वशीकारात्परिपूर्णं योगिनश्चित्तं न पुनरभ्यासकृतं परिकर्मापेक्षत इति ॥ ४० ॥

तत्र शब्दार्थज्ञानविकल्पैः संकीर्णा सवितर्का समापत्तिः । तद्यथा गौरिति शब्दो गौरित्यर्थो गौरिति ज्ञानमित्यविभागेन विभक्तानामपि ग्रहणं दृष्टम् । विभज्यमानाश्चान्ये शब्दधर्मा अन्येऽर्थधर्मा अन्ये विज्ञानधर्मा इत्येषां विभक्तः पन्थाः ।

तत्र समापन्नस्य योगिनो यो गवाद्यर्थः समाधिप्रज्ञायां समारूढः स चेच्छब्दार्थज्ञानविकल्पानुविद्ध उपावर्तते सा संकीर्णा समापत्तिः सवितर्केत्युच्यते । ॥ ४२ ॥

या शब्दसंकेतश्रुतानुमानज्ञानविकल्पस्मृतिपरिशुद्धौ ग्राह्यस्वरूपोपरवता प्रज्ञा स्वमिव प्रज्ञास्वरूपं ग्रहणात्मकं त्यक्त्वा पदार्थमात्रस्वरूपा ग्राह्यस्वरूपापन्नेव भवति सा तदा निर्वितर्का समापत्तिः । तथा च व्याख्यातम् । ॥ ४३ ॥

sûkṣme ni-viśamânasja parât-paramânv-antam sthiti-padam labhata iti / sthûle ni-viśamânasja parama-mahattvântam sthiti-padam cîttasja / evam tâm ubhajîm kotim anudhâvato jo 'sjâpratîdhâtaḥ sa paro vaśi-kâras tad-vaśi-kârât pari-pûrnam joginaś cîttam na punar abhâsa-kr(i)tam parikarmâpekṣata iti // 40 //

tad jathâ gâur iti śabdo gâur itj artho gâur iti ġñânam itj a-vi-bhâgena vi-bhaktânâm api grahanam-dr(i)ṣtam / vi-bhaġjamânâś cânje śabdadharmâ anje 'rtha-dharmâ anje vi-ġñâna-dharmâ itj eśâm vi-bhaktah panthâh /

tatra smâpannasja jogino jo gav-âdj arthah samâdhi-praġñâjâm samârûdhah sa cêc cġhabdârtha-ġñâna-vikalpânuviddha upâvartate sâ samkîrnâ samâpattiḥ sa-vitarketj uġjate / [ (...) // 42 // ]

jâ śabda-samketa-śrutânumâna-ġñâna-vikalpa-smr(i)ti-pari-śuddhâũ grâhja-sva-rûpoparaktâ praġñâ svam iva praġñâ-sva-rûpam grahanâtmakam tjaktvâ(-)padârtha-mâtra-sva-rûpâ grâhja-sva-rûpâ-panneva bhavati sâ tadâ nir-vitarkâ samâpattiḥ / [ (...) // 43 // ]



# I – Samâdhi-ĉapitro (fino)

( *Spirita sintezo de eŭroplingvaj tradukoj* )

40. Por kiu atingas tiun staton, la konscikapablo etendiĝas de senlima eteco al infinita ampleksecio.  
41. Paciginte la mensajn fluktuadojn, la spirito, kiel tute travidebla kristalo, perfekte spegulas plenan percepton konscian pri la konataĵo. Tiu stato nomiĝas *samâpatti*.  
42. *Vitarkâ samâpatti* estas perfekta ricevado kun rezono. En tiu stato, la percepto ankoraŭ uzas mensajn konstruaĵojn ligitajn al vortoj : iliaj sencoj kaj la rezultanta kono.  
43. Kiam la memoro fariĝas tute purigita, tiam aperas *nir-vitarkâ samâpatti*, stato sen rezono, kiu ebligas senperan konon : rektan kuniĝon inter la konscio kaj la konataĵo.

( *Redaktora laŭvorta traduko el sanskrito* )

40. Tiu ĉi [la menso purigita kaj stabila] havas regadon super [ĉio], de la plej infimizezima ĝis la plej ekstrema grandeco.  
41. [La menso] kies turniĝoj ĉesis, pro la fakto ke kiel altkvalita<sup>1</sup> kristalo ĝi almetas plibeligajn kolorojn al tio sur kio ĝi staras, kuniĝas [kun la realo, refraktante ĝin<sup>2</sup>] en perceptanton, perceptilo(j)n kaj perceptaĵo(j)n<sup>3</sup>.  
42. Ĉi-kaze, la kunrezona kuniĝo [de la menso kun objekto] estas miksita kun ideoj [venantaj] de [la] vorto, [la] objekto [mem, kaj de ĉi-ties antaŭa] kono.  
43. Ĉe la finpurigo de la memoro, [en la menso] estas senrezona brilego de la nura objekto, kvazaŭ [la menso<sup>4</sup> estus] malplena je propra formo.

## Komentarioj

### Sanskrita, de Vjaso

40. Ĝi "atingas" la staton de stabileco ĝis [en] la plej el la plej infimizezima de kio ensolviĝas en la subtila ; [ĝi "atingas"] la staton de stabileco de menso ĝis [en] la plej ekstrema grandeco de kio ensolviĝas en la vasta. Supera estas tiu senobstakla regado de kiu tiel strebas al tiuj ambaŭ ekstretoj. La menso de jogano, plenplena je regado super tio, "*ne bezonas denove fari prepariĝon per trejniĝo*".

42. (...) Tio [klariĝas] laŭ jena ekzemplo. Per [=kun] nediferencigo de "la vorto bovino, la objekto bovino kaj [sia antaŭa] kono [pri] bovino", oni [kutime] rigardas la percepton de [tiuj tri] diferencaĵoj ja. Sed disrompitaj [=analizitaj], aliaj estas la karakteroj de vorto<sup>5</sup>, aliaj la karakteroj de la objekto, aliaj la karakteroj de la scio [pri ĝi]. [Ĉiu el] ĉi tiuj [tri] havas diferencon kampon<sup>6</sup>.

Ĉi-kaze, la objekto bovino ktp., kiu kreskante ĉe-estas en la absorbiĝanta konscio de la jogano kuniĝanta [mense kun ĝi], se ĝi aliras [al lia konscio] superŝutita de ideoj [venantaj] de la vorto, [de la] objekto [mem kaj de ĉi-ties antaŭa] kono, [tia] miksita kuniĝo estas nomita "kunrezona".

43. Post finpurigo de la memoro, ne plu aperas ideoj [venantaj] de kion oni lernis aŭ aŭdis, aŭ kion oni konus per indukto<sup>7</sup> ; la objekto perdis [eĉ] sian nomon kaj sencon ; influite de la formo de la perceptaĵo<sup>8</sup>, la konado kvazaŭ forlasas sian propran formon de konado, konsistigita de la perceptilo(j), kaj akceptas la formon mem de la nura objekto<sup>9</sup>, kvazaŭ falante en la propran formon de la perceptaĵo. La kuniĝo tiam estas senrezona.

### Franca, de Micea Eliade

43. En tiu ĉi meditado, la pensado estas liberigita de la ĉeesto de la "mi", ĉar la kona ago ("mi konas tiun objekton" aŭ "tiu objekto estas mia") ne plu okazas ; la penso *estas* (fariĝas) tiu objekto (komentario de Vâcâspati Miŝra ĉe I,43).

La objekto ne plu estas konata per la asocioj

– t.e. envicigita en la serio de la antaŭaj prezentoj, situigata per eleksteraj rilatoj (nomo, dimensioj, uzo, klaso) kaj, por tiel diri, malricigita de la kutima proceso de abstraktado de la profana pensado – ,

ĝi estas senpere kaptata, en sia esenca nudeco, kiel konkreta kaj nereduktebla donitaĵo.

(*Le Yoga, immortalité et liberté*, Payot, 1967, p. 91)

### Redaktora aldono

Kun tio komparinda estas la Bergson-a intuo :

"*On appelle intuition, cette espèce de sympathie intellectuelle par laquelle on se transporte à l'intérieur d'un objet pour coïncider avec ce qu'il a d'unique et d'inexprimable*" (Oni nomas intuo tian mensan "simpation" per kiu oni transportas sin internen de objekto por "koincidi" kun kion unikan kaj neesprimeblan ĝi havas). Tiu franca filozofo, naskita samjare kiel d-ro Zamenhof, aliloke<sup>11</sup> diras ke intuo estas "*conscience immédiate, vision qui se distingue à peine de l'objet vu, connaissance qui est en contact et même coïncide*" ("senpera konscio, vido kiu apenaŭ distingiĝas de la vidata objekto, kono kiu estas en kontakto kaj eĉ koincidas").

एतयैव सविचारा निर्विचारा च सूक्ष्मविषया व्याख्याता ।

सूक्ष्मविषयत्वं चालिङ्गपर्यवसानम् ।

ता एव सबीजः समाधिः ।

निर्विचारवैशारद्येऽध्यात्मप्रसादः ।

ऋतंभरा तत्र प्रज्ञा ।

etajâjva sa-viçârâ nir-viçârâ çâ sùkôsma-viçajâ vjâkhjâtâ / [44]

sùkôsma-viçaja-tvam çâlinga-parj-avasânâ / [45]

tâ eva sa-bîgah samâdhih / [46]

nir-viçâra-vâjçârâdye 'dhjâtma-prasâdah / [47]

r(i)tam-bharâ tatra praçgñâ / [48]

तत्र भूतसूक्ष्मकेष्वभिव्यक्तधर्मकेषु  
देशकालनिमित्तानुभवार्च्छिन्नेषु या समापत्तिः  
सा सविचारेत्युच्यते । ॥ ४४ ॥

ता एव सबीजः समाधिः । ताश्चतस्रः समा-  
पत्तयो बहिर्वस्तुबीजा इति समाधिरपि सबीजः ।  
तत्र स्थलेऽर्थे सवितर्कः निर्वितर्कः । सूक्ष्मेऽर्थे  
सविचारो निर्विचार इति । स चतुर्थोपसंख्यातः  
समाधिरिति ॥ ४६ ॥

निर्विचारवैशारद्येऽध्यात्मप्रसादः । अशुद्ध्या-  
वरणमलापेतस्य प्रकाशात्मनो बुद्धिसत्त्वस्य रज-  
स्तमोभ्यामनभिभूतः स्वच्छः स्थितिप्रवाहो वैशारद्यम् ।  
यदा निर्विचारस्य समाधेर्वैशारद्यमिदं जायते तदा  
योगिनो भवत्यध्यात्मप्रसादः भूतार्थविषयः क्रमान-  
नुरोधी स्फुटः प्रज्ञालोकः । तथा चोक्तम्—

“प्रज्ञाप्रसादमारुह्य अशोच्यः शोचतो जनान् ।  
भूमिष्ठानिव शैलस्थः सर्वान्प्राज्ञोऽनुपश्यति ॥”  
॥ ४७ ॥

तस्मिन्समाहितचित्तस्य या  
प्रज्ञा जायते तस्या ऋतंभरेति संज्ञा भवति । अन्वर्था  
च सा सत्यमेव बिभर्ति । न च तत्र विपर्ययसंज्ञान-  
गन्धोऽप्यस्तीति । तथा चोक्तम्—“आगमेनानु-  
मानेन ध्यानाभ्यासरसेन च । त्रिधा प्रकल्पयन्प्रज्ञां  
लभते योगमुत्तमम् ॥” इति ॥ ४८ ॥

tatra bhûta-sùkôsmakeçv-abhivjakta-dharmakeçu  
deça-kâla-nimittânubhavâvaçchinneçu jâ samâpatti-  
sâ sa-viçâretj ucjate / (...) // 44 //

tâs çatasrah samâpattajo vahir-vastu-bîgâ iti samâ-  
dhir api sa-bîgah / tatra sthûle 'rthe sa-vitarkah nir-  
vitarkah / sùkôsme 'rthe sa-viçâro nir-viçâra iti / sa  
çaturdhopasamkhjâtah samâdhir iti // 46 //

a-çuddhjâvarana-malâpetasja prakâçâtmano buddhi-  
sattvasja raças-tamobhjâm an-abhibhûtah sv-acchah  
sthiti-pravâho vâjçârâdjam / jadâ nir-viçârasja samâ-  
dher vâjçârâdjam idam gâjate tadâ jogino bhavatj  
adhj-âtma-prasâdah bhûtârtha-viçajah kramân anu-  
rodhî sphutah praçgñâ-lokah / tathâ çoktam :

" praçgñâ-prâsâdam âruhja a-çocjah çocato çanân /  
bhûmi-çthân iva çâjla-sthah sarvân praçgñâ'nupaçjati // "  
// 47 //

tasmint\* samâhita-çittasja jâ praçgñâ gâjate tasjâ  
r(i)tam-bhareti samgñâ bhavati / anv-arthâ çâ sâ  
satjam eva bibharti / na çâ tatra viparjâsa-gñâna-  
gandho 'pj astîti / tathâ çoktam :

" âgamenânumânena dhjânâbhjâsa-rasena çâ /  
tridhâ prakalpajan praçgñâm labhate jogam uttamam // "  
iti // 48 //

\* Mi ne komprenas kial estas la lasta t : aŭ pro (de mi) nekonata regulo pri konsonant-ligiteco kun la sekva vorto, aŭ tutsimple kaj pli verŝajne temas pri tajperaro en la *nagarî*-a teksto.

44. Tiu stato ebligas al la konscio aliron al la realeco de subtilaj eksperimentaĵoj eĉ abstraktaj, kun aŭ sen mensa aktiveco.
45. Tiel, atingante la subtilan naturon de la objektoj, tiu stato partoprenas en la nediferencigo.
46. Tiuj ŝtupoj (*samādhi*) ankoraŭ enhavas semojn (pro konsidero de objektoj distingeblaj fronte al la menso).
47. La stato *samādhi* sen mensa ago induktas pacon kaj mensan klarecon.
48. Tie kuŝas vera kono pri la realo.

( *Redaktora laŭvorta traduko el sanskrito* )

44. [Ankaŭ la kuniĝo] kun subtila(j) objekto(j), kunpensa aŭ senpensa, estas plene priskribita ĝuste per tio ĉi [t.e. "brilego de la nura objekto kvazaŭ la menso estus malplena je propra formo"].
45. Kaj la subtileco de objektoj havas kiel finon la sendistingan<sup>12</sup>.
46. Ĝuste tiuj estas kunfonta absorbiĝo.
47. En la matura spertado de la senpensa [absorbiĝo aperas] la klareco de la (super)spirito.
48. La konado tiam entenas la plenan de la Vero.<sup>13</sup>

### Sanskrita komentario de Vjaso (kaj franca de Mircea Eliade)

44. La kuniĝo [kiu kvazaŭ transformiĝas] en [objektojn] kiuj havas subtilajn elementojn kaj diferencajn kvalitojn, karakterizitajn de la spertado de loko, tempo\* kaj [rilato de] kaŭzo [al efiko], tia kuniĝo estas nomita "kunpensa" (...)

\* Pli klare dirite de posta komentariisto, Vijñāna-Bhikṣu (XVI-a jc), laŭ traduko<sup>14</sup> de Mircea Eliade:

" Tiu meditado ankoraŭ estas akompanata de la konscio pri Tempo kaj Spaco (ne de "spertado" de tiu aŭ alia spaco, de tiu aŭ alia daŭro, sed de la konscio pri la kategorioj Tempo-Spaco)."

Mircea Eliade daŭrigas : " Kiam la pensado "identigas sin" kun la *tanmātra* ["infinitezimaj energiaj kernoj"] sen sperti la "sentojn" kiujn, pro sia energia naturo, tiuj *tanmātra* produktas

– t.e. kiam la jogano ilin "asimilas laŭ ide(al)a maniero" sen ke el tio rezultas sento de sufero aŭ de plezuro, aŭ de perforto, aŭ de inerteco ktp., kaj sen esti konscia pri la Tempo kaj la Spaco – , oni atingas la staton *nirvicāra* [senpensa].

La pensado tiam maldistingebligas disde tiuj infinitezimaj energiaj kernoj kiuj konsistigas la veran fundamenton de la fizika universo."<sup>15</sup>

46. "Tiuj kvar kuniĝoj havas fonton ["semon"] en la ekstera realo". Ankaŭ la absorbiĝo estas [do] kunfonta. Ĉi-kaze "la kunrezona kaj senrezona [absorbiĝoj havas sian fonton] en materia objekto, la

*kunpensa kaj senpensa en subtila objekto". "La absorbiĝo estas rigardita kiel kvarobla".*

47. La matura spertado [de la senpensa absorbiĝo] estas klara<sup>16</sup> fluo de konstanteco – ne submetita al pasio (*raĝas*) kaj inerteco (*tamas*) – de pura konscio kies naturo estas brila, libera de la vualanta makulo de malpureco. Kiam okazas tiu ĉi matura spertado de la senpensa absorbiĝo, tiam estiĝas la klareco de la (super)spirito de la jogano [kaj subite] malkovriĝas la mondo de la gnozo, kies kampo estas la realo kaj kiu ne submetiĝas al popaŝa progresado [de la celanto]. Kaj tiel, estas dirite :

*" De la gnozo la altaĵon atinginte,  
ne plu lamentenda, lamentantojn konas  
la saĝul' ; li vidas kvazaŭ de sur monto  
ĉiujn kiuj staras sur la ter' malsupre."*

48. La konscio de la konado naskita de la menso absorbita en tiu [senpensa absorbiĝo] estas [nomita] "portanta<sup>17</sup> de la Vero". Kaj en akordo kun tiu ĉi senco, tiu [konscio] entenas ĝuste la realon. Kaj tiam "ne estas eĉ [restanta]odoro de erara kono<sup>18</sup>". Kaj tiel, estas dirite :

*"Per la tradiciaj scioj, kaj logiko,  
kaj la gusto de l' kontemplo-trejniĝado,  
tiel ĉi triope, gnozo plenumiĝas :  
atingiĝas plej supera unuiĝo [joga]."*

श्रुतानुमानप्रज्ञाभ्यामन्याविषया विशेषार्थत्वात् ।

तज्जः संस्कारोऽन्यसंस्कारप्रतिबन्धी ।

तस्यापि निरोधे सर्वनिरोधान्निर्वीजः समाधिः ।

śrutānumāna-praḡñābhjām anja-viśajā viśeśārthatvât / [49]

taḡ-ḡah samskâro 'nja-samskâra-prati-bandhî / [50]

tasjâpi nirodhe sarva-nirodhân nir-bîḡah samâdhih // 51 //

श्रुतमागमविज्ञानं तत्सामान्यविषयम् । न ह्यागमेन शक्यो विशेषोऽभिधातुम् । कस्मात् ? न हि विशेषेण कृतसंकेतः शब्द इति ।

तथानुमानं सामान्यविषयमेव यत्र प्राप्तिस्तत्र गतिर्यत्राप्राप्तिस्तत्र न भवति गतिरित्युक्तम् । अनुमानेन च सामान्येनोपसंहारः । तस्माच्छ्रुतानुमानविषयो न विशेषः कश्चिदस्तीति । न चास्य सूक्ष्मव्यवहित-विप्रकृष्टस्य वस्तुनो लोकप्रत्यक्षेण ग्रहणमस्ति । न चास्य विशेषस्याप्रामाणिकस्याभावोऽस्तीति । समाधिप्रज्ञानिर्ग्राह्य एव स विशेषो भवति—भूतसूक्ष्मगतो वा पुरुषगतो वा । तस्माच्छ्रुतानुमानप्रज्ञाभ्यामन्य-विषया सा प्रज्ञा विशेषार्थत्वादिति ॥ ४९ ॥

समाधिप्रज्ञाप्रतिलम्भे योगिनः प्रज्ञाकृतः संस्कारो नवो नवो जायते । तज्जः संस्कारोऽन्यसंस्कारप्रति-बन्धी । समाधिप्रज्ञाप्रभवः संस्कारो व्युत्थानसंस्कारा-शयं बाधते । व्युत्थानसंस्काराभिभवात्तत्प्रभवाः प्रत्यया न भवन्ति । प्रत्ययनिरोधे समाधिरुपतिष्ठते । ततः समाधिजा प्रज्ञा ततः प्रज्ञाकृताः संस्कारा इति नवो नवः संस्काराशयो जायते ।

ततश्च प्रज्ञा ततश्च संस्कारा इति कथमसौ संस्काराशयश्चित्तं साधिकारं न करिष्यतीति ?

न ते प्रज्ञाकृताः संस्काराः क्लेशक्षयहेतुत्वाच्चित्त-मधिकारविशिष्टं कुर्वन्ति । चित्तं हि ते स्वकार्यादव-सादयन्ति । ख्यातिपर्यवसानं हि चित्तचेष्टितमिति ॥ ५० ॥

किं चास्य भवति? तस्यापि निरोधे सर्वनिरोधा-न्निर्वीजः समाधिः । स न केवलं समाधिप्रज्ञाविरोधी, प्रज्ञाकृतानामपि संस्काराणां प्रतिबन्धी भवति । कस्मान्निरोधजः संस्कारः समाधिजान्संस्कारान्बाधत इति । निरोधस्थितिकालक्रमानुभवेन निरोधचित्त-कृतसंस्कारास्तित्वमनुमेयम् । व्युत्थाननिरोध-समाधिप्रभवः सह कैवल्यभागीयैः संस्कारैश्चित्तं स्वस्यां प्रकृताववस्थितायां प्रविलीयते । तस्मात् ते संस्काराश्चित्तस्याधिकारविरोधिनो न स्थिति-हेतवो भवन्तीति । यस्मादवसिताधिकारं सह कैवल्यभागीयैः संस्कारैश्चित्तं निवर्तते । तस्मिन्निवृत्ते पुरुषः स्वरूपमात्रप्रतिष्ठोऽतः शुद्धः केवलो मुक्त इत्युच्यते इति ॥ ५१ ॥

śrutam âgama-viḡñānam tat sāmânja-viśajam / na hj âga-  
mena śakjo viśešo 'bhi-dhâtum / kasmât ? na hi viśešena  
kr(i)ta-samketah śabda iti /

tathānumānam sāmânja-viśeśajameva (...) tasmâc çhrutānu-  
māna-viśajo na viśeśah kaś cid astīti / na çâsja sūkṣma-vj-  
avahita-vi-prakr(i)ṣtasja vastuno loka-pratjakṣena grahanam  
asti / na çâsja viśeśasjâprâmânikasjâbhâvo 'stīti / samâdhi-  
praḡñâ-nir-grâhja eva sa viśešo bhavati – bhûta-sūkṣma-  
gato vâ puruṣa-gato vâ / (...) // 49 //

samâdhi-praḡñâ-prati-lambhe joginah praḡñâ-kr(i)tah sam-  
skâro navo navo ḡajate / taḡ-ḡah samskâro 'nja-samskâra-  
prati-bandhî / samâdhi-praḡñâ-prabhavah samskâro vj-  
utthâna-samskârâsajam bâdhate / vj-utthâna-samskârâbhibha-  
vât tat-prabhavâh pratjajâ na bhavanti / pratjaja-nirodhe  
samâdhir upatiṣṭhate / tatah samâdhi-ḡâ praḡñâ tatah pra-  
ḡñâ-kr(i)tâh samskârâ iti navo navah samskârâsajo ḡajate /  
tataś çâ praḡñâ tataś çâ samskârâ iti katham asâu samskârâ-  
râsajaś çittam sâdhikâram na kariṣjati ?

na te praḡñâ-kr(i)tâh samskârâh kleṣa-kṣaja-hetu-tvâc çittam  
adhikâra-viśiṣṭam kurvanti / çittam hi te sva-kârjâd ava-  
sâdajanti / khjâti-parj-avasânam hi çitta-çêṣṭitam iti // 50 //

kim çâsja bhavati ? tasjâpi nirodhe sarva-nirodhân nir-  
bîḡah samâdhih / sa na kevalam samâdhi-praḡñâ-virodhî,  
praḡñâ-kr(i)tânâm api samskârânâm prati-bandhî bhavati /  
kasmân nirodha-ḡah samskârâh samâdhi-ḡân samskârân  
bâdhata iti / nirodha-sthiti-kâla-kramânubhavena nirodha-  
çitta-kr(i)ta-samskârâ-stitvam anumejam / vj-utthâna-ni-  
rodha-samâdhi-prabhavâjh saha kâjvalja-bhâḡijâjh sams-  
kârâjś çittam svasjâm prakr(i)tâv avasthitâjâm pra-vi-lîjate  
/ tasmât te samskârâś çittasjâdhikâra-virodhino na sthiti-  
hetavo bhavantīti / jasmâd avasitâdhikâram saha kâjvalja-  
bhâḡijâjh samskârâjś çittam ni-vartate / tasminn avr(i)tte  
puruṣah sva-rûpa-mâtra-pratiṣṭho 'tah śuddhah kevalo  
mukta itj uçjata iti // 51 //

इति श्रीपातञ्जले सांख्यप्रवचने योगशास्त्रे  
प्रथमः समाधिपादः समाप्तः ॥१॥

iti śrîpâtanḡale sâmkhja-pravaçane joga-śâstre  
prathamah samâdhi-pâdah samâptah //1//

49. La kono kiu deduktiĝas el instruo de sanktaj skriboj kaj el intelekta funkciado, diferenciĝas disde la statoj priskribitaj (*samâdhi*), ĉar malsamas iliaj eksperimento-kampoj.
50. La mensa formo kiu rezultadas de la *samâdhi*-stato, sukcesas malhelpi kreadon de aliaj mensaj formoj.
51. Kiam tia formo mem ĉesas, oni konas la staton sen semo : *nir-bîga samâdhi*, stato je pura konscio.

( Redaktora laŭvorta traduko el sanskrito )

49. [Tiam la konado] havas alian objekton ol ambaŭ konadoj per tradicio kaj per logiko<sup>19</sup>, ĉar ĝi celas ion apartan [aŭ eĉ : "superan"].
50. La mensa dispozicio naskita de tio<sup>20</sup> "forkatenas" aliajn mensajn dispoziciojn.
51. Ĉe la forigo\* ankaŭ de tiu [mensa dispozicio naskita de la absorbiĝo], el la forigo de ĉio [aŭ : ĉiu mensa dispozicio] [venas] la senfonta absorbiĝo.

## Sanskrita komentario de Vjaso

49. La scio per tradicio estas io aŭdita<sup>21</sup>. Ĝia objekto estas la ĝeneralajoj, ĉar ne eblas, per la tradicio, signi al io individua. Kial? Ĉar la vorto ne ricevis konvencian ligilon kun io individua<sup>22</sup>. Simile, la logiko havas kiel kampon nur la ĝeneralajojn (...) Tial "*la objekto de aŭdita [scio] kaj logiko ne estas io individua*".<sup>23</sup> Kaj la kutima percepto ne povas kapti tiun ĉi subtilan, disigitan [disde la fenomenoj], absolutan substanceton.

Sed "*ne estas neekzisto de tiu ĉi aparta [substanco] ne [atingebla] de [la tri] kon-rimedoj*" [t.e. kutima percepto, logiko kaj tradicio]. Tiu aparta [substanco] – kiu aŭ enestas en la atomoj de la ekzistaĵoj aŭ enestas en Dio – estas kaptebla nur de la konado per absorbiĝo.

50. Ĉe la regajno de la gnozo per la absorbiĝo, al la jogano naskiĝas ĉiam nova<sup>24</sup> mensa dispozicio kreita de la gnozo. La mensa dispozicio naskita de tio forkatenas aliajn mensajn dispoziciojn : la mensa dispozicio estiĝanta el la gnozo de la absorbiĝo subpremas<sup>25</sup> la stokon de leviĝantaj mensaj dispozicioj. Pro [ĝia] supereco super la leviĝantaj mensaj dispozicioj, la spertoj kiuj estiĝus el tiuj ne okazas. Ĉe la forigo<sup>26</sup> de la spertoj<sup>27</sup>, la fenomeno de la absorbiĝo stariĝas. "*El tio la gnozo estas naskata de la absorbiĝo, el tio la mensaj dispozicioj estas kreataj de la gnozo*". Naskiĝas ĉiam nova stoko de [tiuj ĉi] mensaj dispozicioj. "*Kaj el tio la gnozo, kaj el tio mensaj dispozicioj*" [ktp.]

– Kiel tiu stoko da mensaj dispozicioj ne faros la menson taskohavanta? Tiuj mensaj dispozicioj kreitaj de la gnozo, ĉar ili estas detrukaŭzo de la turmentoj, ne pliigas la tasko(j)n de la menso, ĉar ili [male] sidigas la menson [senigita] je sia propra farendajo : *al tuta ĉeso de la perceptado fakte strebas la menso*.

51. – *Kaj kio okazas al tiu ĉi [mensa dispozicio naskita de spertado de senpensa absorbiĝo] ?*

– Ĉe la haltigo de ankaŭ tiu ĉi, el la haltigo de ĉiu [mensa dispozicio estiĝas] la senfonta absorbiĝo. Tiu [senfonta absorbiĝo] ne nur estas [reciproke] ekskluziva kun la gnozo de la absorbiĝo [sed] ankaŭ "forkatenas" la gnozo-kreitajn mensajn dispoziciojn.

– *Kial ?* – "*La mensa dispozicio naskita de la haltigo subpremas [aŭ : nuligas] la mensajn dispoziciojn naskitajn de la absorbiĝo*". La ekzisto de mensa dispozicio kreita de haltigita menso estas deduktebla per la sperto de progreso en la tempo da stabileco en haltig(iteco).

Kune kun la mensaj dispozicioj estiĝintaj el la absorbiĝo kun haltigo de la vekita stato [kaj] rilataj al la absoluteco, la menso dissolviĝas en sia propra daŭranta substanco [*prakr(i)ti*]. El tio "*tiuj mensaj dispozicioj, ekskluzivaj de la taskoj de la menso, ne fariĝas kaŭzoj de daŭrigo*" [de la menso]. Ĉar formetante la taskon, kune kun la mensaj dispozicioj rilataj al la absoluteco, la menso haltas.

Ĉe tiu haltigo la spirito estas fiksita en sia nura esenco. Sekve de ĉi tio "*oni diras ke ĝi estas pura, absoluta, liberigita*".

\_\_\_\_\_

Finita estas la *samâdhi*-ĉapitro, la unua en la Yogo-traktato "*Ŝrî-Patañjali-a sankhja-instruo*".

\_\_\_\_\_

\* Etimologie "finbarado" (*ni-rodha*). Tiu vorto aperis ĉe la komenco de la traktato de Patañjali, en la difino mem de jogo : "haltigo de la turniĝoj de l' menso" (*jogaś citta-vr(i)tti-nirodhah*) ; ĝi nun dufoje reaperas en la lasta ero de tiu unua ĉapitro pri absorbiĝo (*samâdhi*), por fermi ĝin kaj montri ke temas pri kompleta tutaĵo, kaj ke la senfonta absorbiĝo estas la fina celo de jogo.

## Postparolo de la redaktoro

La tri aliaj ĉapitroj priskribas nur la rimedojn (*sādhana-pāda* : la ĉapitro pri plenumado); la kvazaŭ-miraklajn atingojn (*vibhūti-pāda* : la ĉapitro pri la povoj, kiu estis forlasita de la tradukinto jene sin pravigante i.a. : "Tiaj povoj ne estas serĉendaj por si mem, kaj la jogisto nepre devos sin malligi de ili sur la Vojo, kiu ne celas akiron de magiaj povoj sed puran liberigon...") ; kaj la finan staton : *kājvalja-pāda* : la ĉapitro<sup>28</sup> pri "soleco"<sup>29</sup>.

Kiel ne pensi pri la devizo de sankta Bruno, la (XIa-jarcenta) fondinto de la kartuzia ordeno, "*Beata solitudo* !" (beatiga soleco). Li ankaŭ skribis en unu el liaj nur du konservitaj leteroj : "*Kiom la soleco kaj la silento de la dezerto alportas da profito kaj da dia ĝuo al kiuj amas ilin, tion scias tiuj kiuj ĝin spertis*".<sup>30</sup>

Eble la redaktoro tie ĉesos (*nirodha* !) sian tradukon, ĉar la jogo-rimedoj estas libre alireblaj preskaŭ ĉie, la povoj ne indas, kaj la fina stato estas komprenebla (kaj do ĝia priskribo, tradukebla) nur post propra spertado. ...Aŭ eble eĉ ne ?, ĉar oni ankaŭ povas tute ne kompreni kio okazis, kaj dum oni "ĝuas" ĝin, tiom longe estas eĉ ne ununura penseto, do nenia kompreno pri ĝi : oni tute ne bezonas tian sekurigan cerbumadon tiam, sed nur poste, kiam oni ekkonscias ke oni povus ne reveni el tiu ekstertempa stato kaj do morti ! En Bharato, pri joganoj oni ne uzas la vorton morto sed absorbiĝo (*samādhi*) : oni ne bruligas iliajn korpojn sed metas aŭ lasas ilin en la "lotusa pozicio" (*padmāsana*) kaj ankaŭ ilia tombo nomiĝas *samādhi*. Ilia lasta absorbiĝo simple ne havis finon : ili daŭre ripozu en la paco de la *kājvalja* !

## Notoj

- 1/ Laŭvorte : supere produktita aŭ naskita (*abhi-ĝāta*).
- 2/ Aŭ pli ekzakte ĉi-ties perceptadon.
- 3/ Temas pri la unua divido de la ununura realo, en subjekton kaj objekto(j)n. La perceptilo(j) estas la seŝso(j)\*.  
\* Ĉiu "maldekstra" elemento de (sanskrita) kunmetaĵo povas esti aŭ singulara aŭ plurala.
- 4/ Persona aldono, tre probable prava\*, pro le ekstrema koncizeco de la sutra stilo.  
\* La sama kiel en la antaŭaj frazoj 40, 41 kaj 42. Se ne, la subkomprenita subjekto estus "la objekto", kio donus (por mi) nekompreneblan sencon al la frazero.
- 5/ *śabda* cetere signifas kaj vorton kaj sonon.
- 6/ Oni povas, laŭ Bangali Baba, traduki tiun ĉi lastan frazon ankaŭ jene : *La vojo de [ĉiu el] ĉi tiuj estas diferenco*. Ĉar laŭ lia noto ili "*respondas al la tri rimedoj de kono*"... (*Yogasūtra of Patanjali with the Commentary of Vyāsa*, Delhi : Motilal Banarsidass, 1990, p. 22). Sed ĉefe ili havas malsamajn kampojn : sona, materia kaj mensa.
- 7/ Mircea Eliade pli simple kaj koncize tradukas tiun frazon per : "la vortaj aŭ logikaj asocioj ĉesas". (*Le Yoga : immortalité et liberté*, Paris : Payot, 1967, p. 91).
- 8/ Ŝajnas ke Mircea Eliade strange tradukas tion ĉi per "*brillante nur kun tiu objekto en ĝi mem*". (samloke)
- 9/ Tiuj du frazeroj estas tre koncize tradukitaj de Mircea Eliade per : "*la penso senpere reflektas sin akceptante la formon de la objekto*". (samloke)
- 10/ Citita de H. Bénac, *Nouveau vocab.*, Hachette, p.102.
- 11/ Citita de M. Barthélemy-Madaule en la art. "Bergson" de la *Encyclopaedia Universalis*, vol. 3 (1968), p. 183a.
- 12/ Aŭ : "senoriginan" (*a-linga*). Ĉar inter aliaj sencoj, *linga* signifas "ion ajn kiu havas originon kaj do povas esti detruota" kaj "*la signon kiu pruvas la ekziston de io*", kiel ekzemple en nia proverbo "*ne estas fumo sen fajro*", fumo estas la *linga* de fajro ; kaj *a-* signifas (ne- aŭ) sen-.  
"*Tie temas pri reala plongo en la esencon mem de la fizika mondo, kaj ne nur en la kvalifikitajn kaj individuigitajn fenomenojn.*" Mircea Eliade, sekve de la antaŭa citaĵo
- 13/ Aŭ : "estas plenplena je la Vero". Laŭvorte : "[estas] havanta abundon [*bhara* substantive, ĉefe fine de kunmetaĵo ; ankaŭ : granda kvanto, maso, eksceso da] *da Vero*". Sed vidu alian interpreton de la kunmetaĵo en la komentario de Vjaso pri ĝi. Mircea Eliade tradukas per : (...)

- atingas la "*fakulton de absoluta kono*" (s.l. p. 93).
- 14/ Tre probable el lia "traktato pri la doktrino de Patañjali", *Yoga-sāra-samgrāha* (editorita de Ganganath Jha, Bombay, 1894), p.5 ; kvankam li ankaŭ komentariis la *Yoga-bhāṣya* de Vyāsa (titolo : *Yoga-vārttika*).
- 15/ *Yoga : Immortalité et liberté*, p. 92
- 16/ *sv-accha*, ekzakta sinonimo de "klareco" (YS I,47 : *prasāda*). La unua etimologie signifas "bone nevualita" (do tute travidebla) kaj kvalifikas i.a. akvon de tute puraj rivero kaj lago ; la dua ankaŭ rilatas al akvo, kiu fariĝis tute pura pro senmovegeco (dank'al kiu ĉiuj malpuraj eroj falis sur la fundon).
- 17/ *bhara* adjektive. 18/ La fakto imagi ke kio estas nereala aŭ malvera estas reala aŭ vera. 19/ Laŭvorte : indukto.
- 20/ La spertado de la senpensa absorbiĝo aŭ/kaj la konado kiu akompanas ĝin. 21/ Sed tiu esprimo estas ambigua ĉar, paradokse, ĝi plej ofte signas la Skribojn (ĉefe Vedoj, kiuj kuŝime estas laŭtlegetaj).
- 22/ Krom, kompreneble, la t.n. propraj nomoj.
- 23/ Neniu pruvo estas necesa por demonstri ke la vorta kaj logika scio neniam povas spertigi al iu la realan naturon de kio estas io en si mem. [La plej simpla ekzemplo estas pri la gusto de nekonataj fruktoj : nenia vorta klarigo povos anstataŭi gustumon. Kiom ajn multege oni sukcesos scii pri ili, oni tamen ne konos ilin ĝis kiam oni estos manĝinta unu el ili, aŭ eĉ nur parteton de ĝi.] Sama estas la kazo kun ni. Nek la memsufiĉaj filozofoj, eĉ erudiciaj pri okcidentaj kaj orientaj filozofioj, nek la modernaj scienculoj povas taksii la karakteron de la Vero kiu aperas en la stato de "unupinteco" [*ekāgratā*] de la menso. (*Noto de Bangali Baba, op. cit. p. 28*).
- 24/ Laŭvorte : "nova nova".
- 25/ Aŭ eĉ : "nuligas".
- 26/ Laŭvorte : "finbarado".
- 27/ Verŝajne de sentoj, ideoj aŭ sensacoj.
- 28/ La Prof. Surendranatha Dasgupta, de *Sanskrit College* (Calcutta), rigardas tiun ĉi 4-an ĉapitron kiel plipostan aldono ; verkitan post la V-a jc. laŭ Jacobi ("The dates of the philosophical Sūtras of the Brahmans", *Journal of American Oriental Society*, vol. XXXI, 1901, p. 2 kaj 25).
- 29/ Aŭ "absoluteco", aŭ ankaŭ "beateco".
- 30/ Prof. Bernard Bligny, *Saint Bruno, le premier chartreux*, Rennes : Ouest-France Univ., 1984, p. 107 & 114.

# Pinokjo kaj teologio

Antaŭ nelonge pasis tra niaj manoj *Pinokjo*, tre konata fabelo de la malpli konata itala aŭtoro "Collodi" (t.e. Carlo Lorenzini), esperantigita de Mirza Marchesi\*. **Kardinalo Biffi**, fama teologo, per tekstaj dokumentoj volis lastatempe pruvi ke la aŭtoro kiu skriblaboradis instinkte, ĝermigis verkon vere katolikan.

Al multaj tiu interpreto ŝajnis la **bapto de la fama marioneto** ! (...) Tro evidentas fakte, ke la kreinto de Pinokjo travivadis en tia kultura etoso dum kiu la strebo plifortigi la unuigon de la itala duoninsulo, ĵus efektigitan, konvinkadis la akademian kaj politikajn regantojn ke la katolikoj kun tuta sia kultura amplekso estas marĝenendaj, kvazaŭ ili estus kontraŭaj al la nova ŝtato.

Kiel povus Collodi konscie partopreni en tia etoso kaj samtempe produkti tian katolikan elpensadon ? La teologa interpretisto turnas la demandon al la psikosociologia esploro, kvankam li mem ofertas sian solvon : la aŭtoro de la *Aventuroj de Pinokjo* lasis sian fantazion nutriĝi el la rivero de la popola kulturo, ensorbiĝinta je kristana menseco.

## Profunda koincido

Supraĵe oni povus vidi la koincidon de la vivkonceptado de la ĉefverko kun la katolika populara pensmaniero en la persista alvoko de la pinokja aŭtoro al bonaj sentoj kaj en la supermezura moralisma admonado. Ne ! Biffi juĝas neserioza tian koincidon, ŝatatan certe de ĉiuj celantoj redukti la katolikan religion al simpla fasko da moralaj normoj. Tia moralisma ŝraŭbiĝo [? tiele] estas, laŭ Biffi, la kaduka parto, eĉ enuiga, de la fabelo. La koincido encentriĝas, male, precize **en la homkonceptado kaj en la mondovizio**, kvazaŭ elmerĝanta el la ekzameno de la du polusoj de la komparo : nome, la vivkonceptado de la *Aventuroj de Pinokjo* kaj tiu de la katolika ortodoksio.

Memkompreneble, la interpreto de Biffi provokis reagojn de iuj kleraj kultantoj de la Itala releviĝo (*Risorgimento*) kiuj emas submeti ĝin nur je laikisma interpreto kvazaŭ ĝi maturiĝis malgraŭ kaj spite de la katolikoj. Sed la defendo zorgis pli substreki la partoprenon, eĉ nekonstantan, de la inventisto de Pinokjo en la tuta itinero de la releviĝo ol repuŝi la novan teologian legad-ŝlosilon. Pri tia pasia partopreno akordiĝas ankaŭ la teologo, laŭ kiu fariĝas ĝuste tial ankoraŭ pli interesa la nova esploraĵo.

Sed kie troviĝas tiaj parencecoj inter Pinokjo kaj la katolika ortodoksio ? Se ni akceptos la riskojn de tre malvasta sintezo, ili estas jenaj.

1/ La anonco de tia **kreinto kiu elektas esti patro**. Pinokjo, ligna kreaĵo, originas el la manoj de iu kiu estas diversa disde li; li estas konstruata kiel aĵo, sed de sia kreinto estas tuj vokata filo. Jen ĉi tie la arkano de ia naturŝanĝeco, kiun superas neeldirebla kaj neantaŭvidebla amo.

2/ La aserto pri la ekzisto de interna malbono en la homo. En tiu ĉi fabelo la konscio pri la morala malbono manifestiĝas tre pinte ; kaj la **malbono fontas el internajoj de la homa koro**. Ĝi ne estas nur konomanko, samkiel en Sokrateca iluminismo ; ĝi ne estas komplete eksplikata per maltaŭgeco aŭ malklereco de sociaj strukturoj, samkiel en la liberalburĝa ideologio polemikanta kontraŭ la *Ancien Régime*, aŭ en la marksista ideologio batalanta kontraŭ tiu liberalburĝa.

3/ La ĉeesto de **ekstera malbono** kiun simbolas la Kato kaj Vulpo kaj la cinika Vireto koruptiga. Ĉiuj tiuj kune kun internaj inklinoj klare aludas al la nekonata sed ĉiam asertita originpeko.

4/ La ĉeesto, **en la homo, de la morala leĝo** kiun la marioneto en si mem perceptas kreski dum li ĝin rompas, kaj kiun li rilatigas al patro Ĝepeto aŭ al la Feino. La konscienco ne estas fluidaĵo kaj la konscienca subjektiveco sendube ne estas memleĝdona.

5/ La **neceso de elaĉetiga perado**. Pinokjo, interne malforta kaj vundata, insidata ekstere de inteligentuloj ruzaj kaj pli lertaj ol li, tute ne kapablas atingi la savon, se ne peras plialta helpanto kiu pacigu lin kun la patro, kaj donacu al li "novan estaĵon". Estas malkonfesata, tie ĉi, la memsufiĉeco iluminisma kaj, male, asertata la neebleco kapabliĝi aŭ sin rekoni kapabla celi savan kondiĉon.

6/ La mistero de **transnaturigo**. Pinokjo akceptas lasi lignan naturon por ricevi naturon patran.

7/ La **duobla destino** : la eblaj rezultoj montriĝas diverĝantaj. Se Pinokjo sublimiĝas pere de la Feino, Meĉo (=Lucignolo) rifuzas la helpon kaj brutiĝas pli kaj pli. La **damniĝo kaj la saviĝo** estas aferoj realaj.

8/ Pinokjo fine deziras transnaturiĝi post tiom da plaĉigaj gluaĵoj al sia ligna naturo : li devas ŝanĝiĝi ĉar la ama alvoko de la patro estas ankaŭ ordono. Laŭ la katolika ortodoksio neniu rajtas rifuzi la transnaturiĝon ofertitan de la libera amo de la Patro\*\*.

**A. Zecchin, L. Mantaut**

\* En 1930. Represo en 1981 de Itala E-Instituto (okaze de la centjariĝo de la verko), 150 p., il., 15 gld.

\*\* Ĉu la homo ne estis kreita libera : kiel li malrajtus uzi sian liberecon, eĉ kontraŭ tiu amo ? (*Notoj de la Red.*)

# Ĉu teologie pravigeblas supereco de iu religio

"*Iom modifita teksto*"<sup>1</sup> de prelego farita de la sekretario de *Bahaa Esperanto-Ligo* la 1-an de aprilo 1994, okaze de la unua *Interreligia Seminario Esperantista* en Tábor<sup>2</sup>.

## I – Difinoj

### Malreligieco / senreligieco / ateismo

Estas unu el la karakterizaj trajtoj de la historio de la lastaj minimume cent jaroj, ke rapidege kaj multloke religio perdis sian signifon kaj influon. Ek de kiam Friedrich Nietzsche deklaris ke "*Dio mortis*" kaj Karl Marx nomis religion "*opio de la popolo*", observeblis kiel de tago al tago religio devis forcedi sian antaŭe apenaŭ kontestatan aŭtoritaton – eĉ ĝis tia grado ke tutaj nacioj, aŭ almenaŭ ties gvidantaroj, deklaris sin **malreligiaj**, deklaris ke religio povas nur damaĝi al la prospero de la popoloj kaj apartenu al la rubaĵoj de la historio.

Ni nun scias al kia kriza stato de la surtera vivo kondukis tiuj senreligiaj gvidantaroj. Multaj jam parolas pri apokalipso kaj jam aŭguras la pereon de la tuta civilizacio.

Por multaj homoj religio estas io nekonata, ilin mi nomas **senreligiaj**. Aliaj ja konas religion sed opinias ĝin malprogresiga, damaĝa, ilin mi nomas **malreligiaj**. Ankoraŭ aliaj ellaboris tutan mondkoncepton sen- kaj kontraŭreligian, ilin mi nomas **ateistoj**.

### Religiemo

Multaj homoj ja tamen ankoraŭ kredas je *io*, eĉ se nur nebule ili povas klarigi kio estas tiu *io*. Multaj ankaŭ estas, ankoraŭ, iel ligitaj al religio, kiu ankaŭ ne estas komplete sensignifa por ili. Tamen, tio ne estas la religio kiu donas vere la fundamenton al ilia ĉiutaga vivo, sed tio estas ĉefe la materiaj intereso kaj ĉiutagaj zorgoj – tiujn homojn mi rigardas pli senreligiaj ol religiaj.

Sed estas pli kaj pli da homoj kiuj ne nur kredas je "io", sed kiuj aktive serĉas religian mondkoncepton kaj kvazaŭ kreas sian propran religion, ĉar ili ne sentas sin apartenantaj al iu el la ekzistantaj religioj : ili estas kvazaŭ religiuloj sen religio kaj ĉi tiujn mi nomas religiemaj.

1/ De la aŭtoro mem. Sed la notoj estas aldonaĵoj de la redaktoro.

2/ Pri tiu ĉi vidu la raporton en n-ro 15, p. 6-7 .

### Vera religianeco

Veran religianecon mia opinie karakterizas almenaŭ la jenaj trajtoj :

1/Kredo je nedifinebla, transcenda, ĉion-reganta kaj kreanta potenco, "Dio", kiel centro de la mondkoncepto

La Korano difinas : "*Al Li apartenas la suvereneco de la ĉielo[j] kaj de la tero. Li igas vivi kaj morti, kaj Li havas povon super ĉiuj aferoj. Li estas la Unua kaj la Lasta, la Videbla kaj la Kaŝita, kaj Li scias ĉion*" (57,3-4)

2/Kredo je profeto, mesaĝisto, manifestiĝo de Dio kiel peranto inter Dio kaj la homoj kaj fondanto de la religio respektive komunumo de kredantoj

Por la kristanoj Jesuo estas "*la vojo kaj la vero kaj la vivo*" kaj "*neniu venas al la Patro*" krom per li (Joh. 14, 6) ; simile, por la islamanoj estas Mahometo kiu gvidas "*sur la rektan vojon*" (1,6) kaj kondukas "*el la mallumo al la lumo*" (5,17).<sup>3</sup>

3/ Mi devas precizigi ke ĉi tie la aŭtoro de la artikolo erare komprenas la du (kriplajn) citaĵojn el "*La Nobla Korano*" (en esperanta traduko de Prof. d-ro Italo Chiussi). La unua estas eltirita el *Al-Fâteha*, "La malfermanta" surao, preĝo adresita al Alaho, kaj tute ne al Mahometo, kiel montras la jene kompletigita citaĵo : "*Estu laŭdegata Allah, Sinjoro de l'Universo, la Donema, la Pardonema, Majstro de la tago de la Lasta Juĝo. Nur Vin ni adoras kaj nur ĉe Vi ni serĉas helpon. Gvidu nin sur la rektan vojon...*" (1,2-6). Same, en la dua pli kompleta citaĵo, "Li" evidente reprezentas (kaj gramatike kaj pro la majusklo) ne Mahometon (ne menciitan en la frazo), sed Alahon :

"*Vere venis al vi lumo de Allah kaj klara libro, per kiu Allah gvidas tiun kiu sekvas Lian plezuron por la afero de la paco, kaj Li kondukas ilin el la mallumo al la lumo per Sia dekreto, kaj gvidas ilin al la rekta vojo.*" (5,16-17)



## super alia ? (sekvote)

Ĉiu vera religio<sup>4</sup> konstruiĝas ĉirkaŭ la kerna personeco de la profeto de kiu ĉio kaj ĉiuj dependas, kaj kiu estas plenaŭtoritata.

### 3/ Kredo je Sankta Libro kaj religia leĝaro

Kiel gvidilon por la persona konduto kaj evoluo, kaj kiel konstitucion por la kunvivado de la kredantoj la profeto donas sian libron kun la leĝoj ricevitaj de Dio. Male al la homaj elpensadoj kaj filozofioj, la tiel fiksita Vorto de Dio estas plenaŭtoritata, nekritikebla, kaj devas esti senkompro-mise rekonata. Homoj estas eraremaj sed la Vorto de Dio, perita tra la profeto kaj fiksita en la Sankta Stribo, prezentas seneraran, puran veron. Vera kredanto povas sin nomi, nur tiu kiu komplete akceptas por si tiun ĉi ; ĉar admonas la Korano :

"Ĉu vi kredas nur al unu parto de la Libro kaj ne kredas al la alia ?" (2,86)

### 4/ Akordo<sup>5</sup> inter teorio kaj praktiko

Tiu ĉi kriterio estas dukiale problemiva. Unue la postuloj de la religiaj instruoj por la konduto kaj sinteno de la kredanto estas tiom altegaj kaj idealegaj, ke apenaŭ iu kapablas ilin atingi. Kutime do kredanto estas pli survoje ol atinginta sian celon. Due, kiu havu la rajton distingi kaj juĝi ? Estas laste nur Dio kiu konas niajn korojn kaj intencojn. Tamen, ja ne povas esti ĉio egala kaj devas ebli, kiel diris Jesuo, verajn kredantojn rekoni "*per iliaj fruktoj*" (Mt 7,16)

Kiel veran religion mi ĉi tie traktas nur la t.n. "grandajn revelaciajn religiojn" aŭ "mondreligiojn". Tio ne signifas ke ekster ili religieco ne eblus.

Religiaj, en pli vasta senco, estas miaopinie kaj la religiemaj kaj la anoj de unu el tiuj religioj. Sube tamen temos esence pri la rilatoj inter la "veraj" religioj.

### Bernhard Westerhoff

4/ Laŭ kiu kriterio, kaj ĉu teologie pravigeblas ke pli veraj estas iuj religioj ol aliaj ? Ŝajnas al mi ke, malgraŭ la oficiala enhavo de la artikolo, senkonscie la aŭtoro ĉi-tiel parte jesas al la titola demando.

Budhismo, hinduismo, kaj verŝajne ankaŭ taoismo, ekzemple, kvankam laŭ mi ne malpli veraj religioj (eĉ se ili eble ne estas "grandaj revelaciaj religioj aŭ mondreligioj"), ne kongruas kun la sekva priskribo. Saman rimarkon eblus fari pri "vera religianeco". Estus do pli bone ne uzi tiun ĉi adjektivon "vera" kun tiel stranga signifo, almenaŭ sen ia bazo en PIV.

5/ En la manuskripto : *agordo*, probable tajperaro ?

## Distingiloj kaj esenco de profeteco Religi-kompara studo

En 1994 mi renkontis Christian Lavarenne okaze de la *WCRP-mondkonferenco* en Riva del Garda (I). Tiutempe mi ankoraŭ estis skribanta mian disertacion pri supra titolo, kaj Christian petis min verki pri ĝi resumon por *Asistilo*. (La verko espere baldaŭ (germanlingve) eldoniĝos\*.)

Unu el miaj intencoj estis prezenti la kompareblecon de profetaj personecoj el diversaj religioj, por scienc-nivele prepari la vojon al la akcepto de profetoj el diversaj religioj. Per tio **la interreligia dialogo estu plivastigata kaj pliintensigata**.

Komparebleco de profetaj figuroj jam rezultas de la idea bazo kiu, en judaismo, kristanismo, islamo kaj bahaismo, montras klarajn komunajn. La religio de Zarathustro senprobleme aldoneblas. Problemo, identigi profetojn, ĝis nun ekzistis rilate al hinduismo kaj budhismo, precipe ĉar "**religi-sciencia dogmo**" atribuis al la **hind-orientazia regiono nur "mistikan" religiecon**.

Por trovado de profetaj distingiloj mi elektis la fenomenologian metodon, tiel ke esplorado de Sanktaj Striboj kaj de biografi-legendaj tekstoj rezultigis entute 67 profetajn kvalitojn kaj kapablecojn. El tiuj, iom pli ol dekduo montris sin aparte oftaj, kaj pro tio povas esti rigardataj kiel "ĉefdistingiloj". La aplikado de *intenc-esploro* de J. Waardenburg krome **montris legitimadon kaj model-efekton kiel signojn de profeteco**, kiuj troviĝas malantaŭ multaj profetaj distingiloj.

Estis montreble ke grupo da profetoj rilate al siaj distingiloj aparte reliefiĝas : la **fond-profetoj** (ekz. Muhammado, Jesuo, Budho). Speciale leĝdonado kaj Sankta Familio, sed ankaŭ nekutimecoj dum infanaĝo kaj aliaj estas kromaj distingiloj de tiu ĉi grupo.

Funkcie oni povas apartigi antaŭ respektive post tiu ĉi fond-profetoj la "**komenc-profetojn**" respektive "**disĉiplo-profetojn**". Tiaj profet-specoj kaj ilia kombino estis demonstreblaj ankaŭ rilate al hinduismo kaj budhismo. Plie de la 67 menciitaj kvalitoj kaj kapablecoj rilate al Budho kaj Kriŝno pokaze ĉirkaŭ 55 estas dokumenteblaj ; por la hindaj riŝioj, kiuj tradicie estas rigardataj kiel aŭtoroj de la Vedo, minimume 35.

Ankaŭ ĉe antikvaj altkulturoj kaj indianaj popoloj, profetaj personecoj estas konstateblaj.

**Kiel motivo por profeta ago fine de ĉi tiu esploro, ilia amo al Dio kaj al la homoj estas ek-konebla.** Michael Sturm-Berger (marte 1996)

\* Mendebila ĉe *Verlag für Wissenschafts- und Religionsgeschichte*, dr. Michael Engel, Kaiserdamm 102 D-14057 Berlin-Charlottenburg (Tel. 030/3212671).

# La Serĉado de l'Sankta Gralo :

## Ĉeval-batalo

[56,1] Or di li contes que qant Galaad se fu partiz dou Chastel as Puceles, que il chevaucha tant par ses jornees que il vint en la Forest Gaste. Un jor li avint que il encontra Lancelot et Perceval qui chevauchent ensemble ; et nel connurent pas, come cil qui tiex armes n'avoient pas aprises a veoir. Si li adrece Lancelot touz premiers et li brise sa lance en mi le piz. Et Galaad le fiert si durement que il abat et lui et le cheval tout en un môt, mes autre mal ne li fist. Puis trait l'espee qant il ot le glaive brisié et fiert Perceval si durement que il li trenche le hiaume et al coife de fer ; et se l'espee ne li fust tornee en la main, ocis l'eust sanz faille. Et neporquant il n'a mie tant de pooir qu'il remaigne en sele ; ainz vole jus si vainz et si maz del grant cop qu'il ot receu qu'il ne set s'il est nuiz ou jors. Et cele joste fu fete devant un hermitage ou une recluse manoit. Et qant ele en vit Galaad aler, si li dist : « *Ore alez a Dieu qui vos conduie ! Certes, se il vos conneussent aussi bien come je vos conois, il n'eussent ja tant de hardement que il a vos se preissent.* » Et quant Galaad ot ceste parole, si a grant poor de conoissance. Si broche cheval des esperons et s'en vet si grant oirre come il puet del cheval trere. Et quant il se sont aperceu que il s'en vet, si montent en lor chevaus au plus tost que il onques pueent. Et quant il voient que il ne le porront aconsivre, si retornent tant dolent et tant corrocié que il voldroient morir sanz demorance, car or heent il trop lor vies ; si se metent en la Forest Gaste.

Einsi est Lanceloz remes en la Forest Gaste dolenz et corrociez dou chevalier qu'il a perdu. Si dist a Perceval : « *Que porrons nos fere ?* » et il respont qu'il ne set nul consoil metre en ceste chose. Car li chevaliers s'en vet si grant oirre qu'il nel porroient aconsivre. « *Et vos veez, fet il, que la nuiz nos a surpris en tel leu dont nos ne porrons ja mes issir se aventure ne nos en gitoit fors. Et por ce m'est il avis que mienz nos vendroit retourner au chemin. Car se nos començons ci a desvoier, je ne cuit mie que nos reveignons au droit chemin mes en piece. Or en feroiz ce que vos plaira ; car je voi plus nostre preu ou retourner que en l'aler.* » Et Lanceloz dit que el retourner ne s'acorderoit il mie volentiers, ainz ira après celui qui l'escu blanc emporte : car il ne sera ja mes aeise devant que il savra qui il est. « *Tant vos poez vos bien soffrir, fet Perceval, que li jorz de demain soit venuz. Et lors en irons moi et vos après le chevalier.* » Et il dit que il n'en fera riens. « *Or vos conseut Diex, fet Perceval, car je n'irai mes hui avant, ainz retournerai a la recluse qui dist que ele le devoit bien conoistre.* »

Einsi se departirent li compaignon ; si s'en revint Perceval a la recluse. (...)

Nun diras la rakonto, ke kiam Galad foriris de l'Kastelo je l'Virgunlinoj, (ke) li rajdadis tiom per siaj [surĉeval]tagoj ke li alvenis en la Vast-Arbaron. Iun tagon okazis al li ke li renkontis Lanceloton kaj Percevalon kiuj rajdadis kune ; kaj ili lin ne rekonis, kiel iuj kiuj ne esti lernintaj tiajn armilojn vidi. Tiam lin celas Lanceloto tute unue kaj kontraŭ li rompas sian lancon ĉe la mezo de la brusto. Kaj Galad lin frapas tiel krude ke li faligas kaj lin kaj la ĉevalon kiel unu tuton, sed alian malbonaĵon al li ne faris. Li poste elingigas sian glavegon ĉar lia lanco estis rompita, kaj frapas Percevalon tiel krude ke li trahakas lian helmon kaj lian feran ĉapon ; kaj se la glavego ne estus turniĝinta en lia mano, li lin mortigus tutcerte. Kaj tamen tiu ĉi ne havas tiom da potenco ke li povis resti sur la selo ; tiel li flugas teren tiom senforta kaj malvigla pro l' granda bato kiun li ricevis, ke li ne scias ĉu tagas aŭ noktas.

Kaj tiu ĉevalbatalo estis farata antaŭ ermitejo kie enermicino restadis. Kaj kiam ŝi vidis Galadon for iri, ŝi diris al li : « *Nun iru al Dio kiu vin kondukas ! Certe, se ili vin konus same bone kiel mi vin konas, ili ne havus tiam la aŭdacon kun vi sin kompari.* » Kaj kiam Galad aŭdas tiun ĉi parolon, li havas grandan timon esti rekonata. Tiam li pikas la ĉevalon per la spronoj kaj foriras laŭ tia granda rapideco kia li povas el l' ĉevalo eltiri. Kaj kiam ili ekkonscias ke li foriras, ili surĉevaliĝas tuj kiam ili povos. Kaj kiam ili vidas ke ili ne povas lin postkure atingi, ili returniĝas tiom bedaŭrantaj kaj afliktitaj, ke ili volus morti senprokraste, ĉar nun ili tro malamas siajn vivojn ; tiam ili [profunde] eniras en la Vast-Arbaron.

Tiel Lanceloto estas englutiĝinta en la Vast-Arbaron, suferanta kaj afliktita pro l' kavaliro kiun li perdis. Tiam li diras al Percevalo : « *Kion ni povos fari ?* », kaj tiu ĉi respondas ke li scias nenian konsilon doni pri tio ĉi. Ĉar la kavaliro foriras laŭ tiel granda rapideco ke ili ne povus lin postkure atingi. « *Kaj vi vidas, diras li, ke la nokto surprizis nin en tia loko el kia ni ne iam povus eliri se aventuro ne nin tirus eksteren. Kaj pro tio mi opinias ke pli bone fariĝus se ni reirus sur la vojon. Ĉar se ni komencas nun devojiĝi, mi kredas ke ni ne revenos sur la rektan vojon [krom] antaŭ longa [tempo]. Nun pri tio vi faros kio al vi plaĉos : ĉar mi vidas pli nian profiton en la reveno ol en la [plua] irado.* » Kaj Lanceloto diras ke pri l' reveno li ne konsentos volonte, tiel li iros post tiu kiu la blankan ŝildon portas : ĉar li estos ne iam bonfartanta antaŭ ol li scios kiu li estas. « *Tiom vi bone povas prokrasti, diras la alia, ĝis okazos la morgaŭa tagiĝo. Kaj tiam for iros mi kaj vi post la kavaliro.* » Kaj la alia diras ke li tion ne faros. « *Nun vin gardu Dio, diras Percevalo, ĉar mi ne iros nun plu, tiel mi reiros al la enermicino, kiu diris ke ŝi devas lin bone koni.* »

Tiel disiĝis la kompanianoj ; tiam revenis Percevalo al la enermicino. (...)\*

## VII – Percevalo kaj le enermicino

### Ama gastigado

[71,29] Or dit li contes que quant Perceval se fu partiz de Lancelot, qu'il retorna a la recluse dont il cuidoit oïr noveles dou chevalier qui eschapez lor estoit. Et quant il fu retornez, si li avint qu'il ne pot trover nul droit sentier qui cele part le menast. Et neporec il s'adreça la ou il cuidoit que ce fust au mielz qu'il pot.

Et quant il vint a la chapele, si hurta al petite fenestre a la recluse, et ele li ovri maintenant come cele qui ne dormoit mie. Si mist sa teste au plus avant que ele pot et li demande qui il est. Et il dist qu'il est de la meson le roi Artus et a non Perceval le Galois. Et quant cele ot son non, si a mout grant joie, car molt l'amoit, et ele si devoit fere come celui qui ses niés estoit. Et ele apele sa mesniee de laienz et lor comande que il oevrent l'uis au chevalier qui la fors est, et li doignent a mengier s'il en a mestier et le servent de quan il porront, car ce est li hons el monde que ele plus aime. Et cil de laienz font son comandement et viennent a l'uis et le defferment et reçoivent le chevalier et le desarment et li donent a mengier.

Et il demande se il porra mes hür parler a la recluse. « *Sire, font cil, nanil, mes demain après la messe cuidons nos bien que vos li puissiez parler.* » Et il s'en sueffre atant et se couche en un lit que cil de laienz li firent ; et se reposa toute la nuit come cil qui las estoit et travailliez.

L'endemain, quant li jorz fu clers, se leva Perceval et oï messe, et li preudons de laienz li chanta. Et quant il fu armez, si vint a la recluse et li dist : « *Dame, por Dieu dites moi noveles dou chevalier qui par ci passa hier, a qui vos deistes que vos le deviez bien conoistre : car il m'est tart que je sache qui il est.* » Et quant la dame ot ceste novele, si li demande por quoi il le quiert. « *Por ce, fet il, que je ne serai ja mes aeise devant que l'aie trouvé et me combate a lui. Car il m'a tant meffet que je ne le porroie mie lessier sanz honte avoir.* »

– « *Ha ! Perceval, fet ele, que est ce que vos dites ? Voulez vos combatre a lui ? Avez vos talent de morir ausi come vostre frere, qui sont mort et ocis par lor outrage ? Et certes, se vos morez en tel maniere, ce sera damages granz et vostre parenté en abessera mout. Et savez vos que vos i perdreiz, se vos a cel chevalier vos combattez ? Je le vos dirai.*

Nun diras la rakonto, ke kiam Percevalo disiĝis de Lanceloto, (ke) li returniĝis al la enermicino, el kiu li kredis ke li aŭdos novaĵojn pri la kavaliro kiu de ili eskapis. Kaj kiam li estis returnita, tiam al li okazis ke li ne povis trovi iun rektan padon kiu al tiu loko lin konduku. Kaj tamen li sin direktis tien kie li kredis ke tio estis la plej taŭga kiun li povis [trovi].

Kaj kiam li alvenis al la kapelo li frapis je la malgranda fenestro de la enermicino, kaj ŝi al li malfermis tuj, kiel iu kiu ne dormis. Tiam ŝi metis sian kapon la plej eksteren kiel ŝi povis kaj lin demandis kiu li estas. Kaj li diris ke li estas el la anaro de l' reĝo Arturo kaj havas la nomon Percevalo la Kimro. Kaj kiam ŝi aŭdas lian nomon, ŝi havas multe grandan ĝojon, ĉar multe lin amis, kaj ŝi tiel devis fari ĉar li ŝia nevo estis.

Kaj ŝi vokas sian servistaron de tie ene kaj ilin ordonas ke ili malfermu la pordon al la kavaliro kiu tie ekstere estas, kaj al li donu ion por manĝi se li tion bezonas kaj lin servu tiom kiom ili povos, ĉar tiu estas la homo kiun en la mondo ŝi plej amas. Kaj la enuloj plenumas ŝian ordonon kaj venas al la pordo kaj ĝin malfermas kaj akceptas la kavaliron kaj demetas lian armilaron kaj al li donas ion por manĝi.

Kaj li demandas ĉu li povos tuj paroli kun la enermicino. « *Sinjoro, diras tiuj, ne, sed morgaŭ post la meso ni bone kredas ke vi povos kun ŝi paroli.* » Kaj li sin detenas tiumomente kaj kuŝiĝas sur liton kiun la enuloj por li preparis ; kaj li ripozis la tutan nokton kiel iu kiu estis laca kaj elĉerpita.

### Rekono

La sekvan tagon, kiam estis hele, Percevalo ellitiĝis kaj aŭdis meson, kaj la noblulo de tie ene por li ĝin kantis. Kaj kiam li estis surmetinta sian armilaron, li venis al la enermicino kaj al ŝi diris : « *Damo, pro Dio diru al mi novaĵojn pri la kavaliro kiu preter ĉi tie pasis hieraŭ, al kiu vi diris ke vi devas lin bone koni : ĉar por mi malrapide pasas la tempo ĝis kiam mi scios kiu li estas.* » Kaj kiam la damo aŭdas tion, al li ŝi demandas pro kio li tion deziras. « *Pro tio, diras li, ke mi ne estos iam plu bonfartanta antaŭ ol mi estos lin trovinta kaj batalinta kontraŭ li. Ĉar li tiom misfaris al mi ke mi ne povos lin lasi sen honton havi.* »

– « *Ha ! Percevalo, diras ŝi, kion vi diras ? Ĉu vi volas batali kontraŭ li ? Ĉu vi havas deziron morti tiel kiel viaj fratoj, kiuj mortis, murdigitaj pro sia ofendego ? Kaj certe, se vi mortos laŭ tia maniero, tio estos damaĝo granda kaj via parencaro pro tio malleviĝos multe. Kaj ĉu vi scias kion vi tiel perdos, se vi kontraŭ tiu kavaliro batalos ? Mi tion al vi tuj diros.*

\* Ĉi tie komenciĝas la rakonto pri la aventuro de Lanceloto, jam tradukita en la antaŭa numero (18, p. 20-23).

« Il est voirs que la grant Queste dou Saint Graal est comenciee, et en estes compainz, ce m'est avis, et sera menee a fin prochainement se Dieu plaist. Et il est einsint que vos querez mout greignor honor que vos ne cuidiez, se vos solement vos tenez de combatre a cel chevalier. Car ce savons nos bien, en cest païs et en maint autre leu, que au parsommer avra trois precieux chevaliers qui avront le los et le pris de la Queste sor toz les autres : si en seront li dui virge et li tierz chastes. Et de ces deus virges sera li chevaliers que vos querez li uns et vos li autres, et li tierz Boorz de Gaunes. Par ces trois sera la Queste achevee. Et puis que Diex vos a ceste honor apareilliee a avoir, mout seroit granz damages se vos entretant queriez vostre mort. Et vos la hasterez bien, se vos a celui que vos querez vos combattez, car sanz faille il est mout mielres chevaliers que vos n'estes, ne que hons que len conoisse. »

– « Dame, fet Perceval, il me semble, a ce que vos me dites de mes freres, que vos sachiez bien qui je sui. » – « Je le sai bien, fet ele, et bien le doi savoir : car je suis vostre ante et vos mes niez. Ne nel doutez mie por ce que je sui ci en povre leu ; ainz sachiez por voir que je sui cele que len apela jadis la reine de la Tere Gaste. Si me veistes ja en autre point que je ne sui ore, car je estoie une des plus riches dames dou monde. Et neporquant onques cele richesce ne me plot tant ne embeli come fet ceste povretez ou je suis ore. »

### Novajoj pri la patrino

Quant Perceval ot ceste parole, si comence a plorer de la pitié que il a ; si li sovient tant qu'il la conut a s'antain. Et lors s'asiet devant il et li demande noveles de sa mere et de ses parenz. « Coment, fet ele, biaux niés, ne savez vos nules noveles de vostre mere ? »

– « Certes, fet il, dame, nanil : je ne sai s'ele est morte ou vive. Mes maintes foiz m'est ja venue dire en mon dormant que ele se devoit mout mielz plaindre de moi que loer, car je l'avoie presque maubaillie. » Et quant la dame ot ceste parole, si li respont morne et pensive : « Certes, fet ele, a vostre mere veoir, se ce n'est en songe, avez vos failli : car ele est morte des ce que vos alastes a la cort le roi Artus. »

– « Dame, fet il, coment fu ce ? » – « Par foi, fet ele, vostre mere fu si dolente de vostre departement que le jor meismes, si tost come ele fu confesse, morut. »

– « Or ait Dieus merci de s'ame, fet il. Car certes ce poise moi mout ; mes puis que einsint est avenu, a soffrir le me covient, car a ce repeirerons nos tuit. Et certes je n'en oï onques mes noveles. Mes de cel chevalier que je quier, por Dieu, savez vos qui il est ne dont, ne se ce est cil qui vint en armes vermeilles a cort ? »

– « Oïl, fet ele, par mon chief ; il y vint a droit ; si vos dirai par quele senefiance ce fu. »

« Estas vere ke la granda Serçado de l'Sankta Gralo estas komencita – kaj vi estas kompaniano je ĝi, mi opinias – , kaj estos alkondukita al fino baldaŭ se al Dio plaças. Kaj (estas) tiel (ke) vi serças multe pli grandan honoron ol vi kredis, se vi nur vin tenas de batali kontraŭ tiu kavaliro. Ĉar tion scias ni bone, ĉi tie kaj en multaj aliaj lokoj, ke finfine estos tri altvaloraj kavaliroj kiuj havos la laŭdon kaj la premion de la Serçado, super ĉiuj aliaj : el ili du estos virgaj kaj la tria ĉasta. Kaj el tiuj du virgaj unu estos la kavaliro kiun vi serças kaj vi la alia, kaj la tria Bort el Gaŭnes. De tiuj tri la Serçado estos plenumata. Kaj tial ke Dio vin preparis tiun honoron havi, estus tre granda domaĝo se vi intertempe serĉus vian morton. Kaj vi ĝin plifruigos multe, se vi kontraŭ tiu kiun vi serças batalos, ĉar senerare li estas multe pli bona kavaliro ol vi estas kaj ol [kiu ajn] homo kiun oni konas. »

« Damo, diras Percevalo, ŝajnas al mi, laŭ kion vi min diras pri miaj fratoj, ke vi scias bone kiu mi estas. » – « Mi tion scias bone, diras ŝi, kaj bone tion devas scii : ĉar mi estas via onklino kaj vi mia nevo. Kaj pri tio ne dubu pro tio ke mi estas ĉi tie en malriĉa loko ; tiel sciu por vidi, ke mi estas tiu kiun oni antaŭe nomis la reĝino de Vastlando. Tiam vi min vidis en alia situacio ol mi estas nun, ĉar mi estis unu el la plej riĉaj damoj en la mondo. Kaj tamen neniam tiu riĉeco min plaĉis tiom nek plezurigis, kiom faras tiu ĉi malriĉeco en kiu mi estas nun. »

Kiam Percevalo aŭdas tiun parolon, li komencas plori pro la kompato kiun li havas ; li tiom memoras ke li ŝin konis kiel sian onklinon ! Kaj tiam li sidiĝas antaŭ ŝin kaj de ŝi petas novaĵojn pri sia patrino kaj pri siaj parencoj. « Kio ! diras ŝi, bela nevo, ĉu vi ne scias iujn novaĵojn pri via patrino ? » – « Certe, diras li, damo, ne : mi ne scias ĉu ŝi estas morta aŭ viva. Sed multfoje ŝi jam min venis diri en mia dormo ke ŝi devis multe pli plendi pri mi ol min laŭdi, ĉar mi preskaŭ ŝin mistraktis. » Kaj kiam la damo aŭdas tiun parolon, ŝi lin respondas trista kaj pensema : « Certe, diras ŝi, vian patrinon vidi, krom en songo, vi estas fininta [t.e. ne plu povos] : ĉar ŝi mortis tuj post kiam vi iris al la kortego de l'reĝo Arturo ». »

– « Damo, li diras, kiel okazis ? » – « Je mia fido, diras ŝi, via patrino estis tiel afliktita pro via foriro ke la tagon mem, tiel frue kiel ŝi estis konfesinta, ŝi mortis. » – « Nun havu Dio kompaton al ŝia animo, diras li. Ĉar certe tio pezas sur min multe ; sed ĉar tiel okazis, konvenas al mi tion elteni, tial ke al tio [la morto] iros ni ĉiuj. Kaj certe pri ŝi mi neniam aŭdis novaĵojn. Sed pri tiu kavaliro kiun mi serças, pro Dio, ĉu vi scias kiu li estas kaj de kie, kaj ĉu li estas tiu kiu venis kun vermilionaj armiloj al la kortego ? »

– « Jes, diras ŝi, sur mia kapo ! li tien venis konvene ; kaj mi diros al vi kun kiu signifo tio okazis. »

## La unua Tablo

« Vos savez bien que puis l'avenement Jhesucrist a eu trois principaus tables ou monde. La premiere fu la Table Jhesucrit ou li apostre mengierent par plusor foiz. Cele fu la table qui sostenoit les cors et les ames de la viande dou Ciel. A cele table sistrent li frere qui estoient une meisme chose en cuer et en ame ; dont David li prophetes dist en son livre une mout merveilleuse parole : *"Mout est, fist il, bonne chose quant frere habitent ensemble en une volenté et en une huevre."*

« Par les freres qui a cele table sistrent fu pes et concorde et patience, et toutes bones huevres pot len bien en aux veoir. Et icele table establi li Aigniax sanz tache qui fu sacrefiez por nostre redemption.

« Vi scias bone ke ekde la alveno de Jesukristo, estis tri çefaj tabloj en la mondo. La unua estis la Tablo de Jesukristo kie la apostoloj manĝis plurajn fojojn. Tiu estis la tablo kiu subtenis la korpojn kaj la animojn per la manĝo de l'Çielo. Çe tiu tablo sidis la fratoj kiuj estis unu sama tuto per koro kaj per animo ; pri kio Davido la profeto diris en sia libro tre mirindan parolon : *"Estas tre granda bonaĵo, diris li, kiam fratoj kune vivas, kun unu volo kaj unu laboro"*.\*

« Inter la fratoj kiuj çe tiu tablo sidis, estis paco kaj konkordo kaj pacienco, kaj çiujn bonajn agadojn oni povis bone en ili vidi. Kaj çi tiun tablon establis la senmakula Ŝafido kiu estas oferita por nia elaçeto.

## La dua Tablo

« Après cele table fu une autre table en semblance et en remembrance de lui. Ce fu la Table dou Saint Graal, dont si grant miracle furent jaadis veu en cest païs au tens Joseph d'Arimatee, au commencement que crestientez fu aportee en ceste terre, que tuit preudome et tuit mescreant devroient avoir toz jorz mes celui miracle en remembrance. Il avint lors que Joseph d'Arimatee vint en ceste terre et molt granz pueples avec lui, tant qu'il porent bien estre par conte quatre mile, tuit povre home.

« Et quant il vindrent en cest païs, si se desconforterent mout de ce que il orent poor que viande ne lor fausist, por ce que si grant pueple estoient. Un jor errerent par une forest ou il ne troverent que mengier ne gent nule. Si en furent mout esmaïé, car il n'avoient pas ce apris. Si se soffrirent celui jor einsint, et l'endemain cerchierent amont et aval et trouverent une vieille fame qui apportoit douze pains dou for. Et il les achaterent. Et quant il les voldrent departir, si monta ire et mautalenz entr'ax, car li un ne se voloient acorder a ce que li autre voloient fere. Ceste aventure fu nonciee a Joseph, dont il fu mout corociez quant il le sot. Si comanda que li pain fussent aporté par devant lui, et len les i aporta. Si i vindrent cil qui achatez les avoient ; et lors sot par la bouche de ceulx que li un ne se voloient pas acorder as autres. Et lors comanda a tout le pueple qu'il s'aseissent ausi come s'il fussent a la Ceinne. Et il despeça les pains et les mist çà et là et mist ou chief de la table le Saint Graal, par qui venue li douze pain foisonerent si que toz li pueples, dont il avoit bien quatre mile, en furent repeu et rasaziez trop merveilleusement.

« Et quant il virent ce, si rendirent graces et merciz a Nostre Seignor de ce qu'il les avoit secoreuz si apertement.

« Post tiu tablo estis alia tablo kiel similaĵo kaj memoro de ĝi. Tiu estis la Tablo de l'Sankta Gralo, kie tiel grandaj mirakloj estis iam vidataj en tiu çi regiono en la tempo de Jozefo el Arimateo, çe la komenco kiam la kristaneco estis alportata en tiun çi landon, ke çiuuj nobluloj kaj çiuuj miskredantoj devus çiam plu havi tiun miraklon en memoro. Ĝi okazis kiam Jozefo el Arimateo venis en tiun çi landon kaj multaj grandaj homamasoj kun li, tiom ke ili bone povis esti laŭkalkule kvar mil, çiuuj malriçaj homoj.

« Kaj kiam ili alvenis en tiun çi regionon, ili fariĝis multe senkuraĝigitaj de tio ke ili timis ke manĝaĵo al ili mankos, pro tio ke tiel grandaj homamasoj ili estis. Iun tagon ili vagadis tra arbaro kie ili ne trovis kion manĝi nek iun homon. Pro tio ili multe malsereniĝis, çar ili ne estis al tio alkitimiĝintaj. Ili sufere eltenis tiun tagon tiel, kaj la sekvan tagon ili serçis almonten kaj alvalen kaj trovis maljunan virinon kiu alportis dekdu panojn el la bakujo. Kaj ili açetis ilin. Kaj kiam ili volis ilin dividi, tiam leviĝis kolero kaj malbonvolo inter ili, çar unuj ne volis konsenti kun kion aliaj volis fari. Tiu çi aventuro estis rakontata al Jozefo, pro kio li estis multe afliktata kiam li tion eksciis. Tial li ordonis ke la panoj estu alportataj antaŭ lin, kaj oni ilin tien alportis. Kaj tien venis tiuj kiuj ilin açetis ; kaj li eksciis per ilia propra buŝo ke unuj ne volis konsenti kun aliaj. Kaj li tiam ordonis al la tuta homamaso, ke ili sidiĝu kvazaŭ ili estus çe la Sankta Manĝo. Kaj li dispecigis la panojn kaj ilin metis tien kaj çi tien kaj metis çe la ekstremajon de la tablo la Sanktan Gralon, per kies alveno la dekdu panoj abundis tiom ke la tuta homamaso, el kiu estis almenaŭ kvar mil [homoj], kontentiĝis kaj satiĝis tute mirinde.

« Kaj kiam ili vidis tion, ili laŭdis kaj dankis Nian Sinjoron pro tio ke li ilin savis tiel videble.

## La miraklo de la Seĝo

« En cele table avoit un siege ou Josephes, li filz Joseph d'Arymacie, devoit seoir. Et cil sieges estoit establiz a ce que li mestres d'aux et li pastres s'i aseist, ne a nul autre n'ert otroiez ; et ert sacrez et beneiz de la main Nostre Seignor meismes, si com l'estoire le devise, et avoit receue la cure que Josephes devoit avoir sus crestiens. Et en cel siege l'avoit Nostre Sires asis ; et por ce n'i avoit si hardi qui s'i osast aseoir. Et cil sieges avoit esté fez par essample de celui siege ou Nostre Sires sist le jor de la Ceinne, quant il fu entre ses apostres come pastres et come mestres. Et tout ausi come il ert sires et mestres de touz ses apostres, tout ausi devoit Josephes conduire toz ceus qui a la Table dou Saint Graal seoient : il en devoit estre mestres et sires.

« Mes il avint, quant il furent venu en cest país et il orent grant piece erré par les estranges terres, que dui frere, qui estoient parent Josephe, orent envie de ce que plus haut d'eus l'avoit Nostre Sires levé et de ce qu'il l'avoit esleu au meillor de la compagnie. Si en parlerent priveement et distrent qu'il nel soffreroient mie a lor mestre : car d'ausi haut lignage estoient il com il estoit, et por ce ne se tendroient il plus a si deciple ne mestre ne l'apele-roient. Et l'endemain, quant il orent monté un grant terre et les tables furent mises et il voldrent aseoir Josephe ou plus haut siege, si le contredirent li dui frere, et s'i asist voiant toz li uns d'aux. Et maintenant en avint uns tiex miracles que la terre absorbi celui qui ou siege s'estoit asis. Et cest miracles fu tantost seuz par cest país, dont li sieges fu puis apelez li Sieges Redoutez. Si ne fu puis nus si hardiz qui s'i aseist, fors cil que Nostre Sires i avoit esleu. »

« Ĉe tiu tablo estis seĝo kie Jozefeo, la filo de Jozefo el Arimateo, devis sidi. Kaj estis preskribite ke sur tiu seĝo ilia majstro kaj pastro sidu, kaj tio al neni alia estis permesita ; kaj ĝi estis sakraligita kaj benita de la mano de Nia Sinjoro mem, almenaŭ laŭ kion la rakonto diras, kaj ricevis la zorgon kiun Jozefeo devis havi pri la kristanoj. Kaj sur tiun seĝon lin sidigis Nia Sinjoro ; kaj pro tio ne estis iu tiel aŭdaca ke li kuraĝis tien sidiĝi. Kaj tiu seĝo estis farita laŭ la modelo de la seĝo kie Nia Sinjoro sidis la tagon de la Manĝo, kiam li estis inter siaj apostoloj kiel pastro kaj kiel majstro. Kaj tute kiel li estis sinjoro kaj majstro de ĉiuj siaj apostoloj, tute tiel devis Jozefeo konduki ĉiujn kiuj ĉe la Tablo de l'Sankta Gralo sidis : de ili li devis esti majstro kaj sinjoro.

« Sed okazis, kiam ili estis alvenintaj en tiun ĉi landon kaj longan tempon migradintaj tra la fremdaj regionoj, ke du fratoj, kiuj estis parencoj de Jozefeo, havis envion pro tio ke pli alten ol ili lin Nia Sinjoro levis kaj pro tio ke li lin elektis kiel la plej bonan el la kompanio. Ili pri tio parolis private kaj diris ke ili ne lin toleros kiel sian majstron ĉar de same alta linio devenis ili kiel li devenis, kaj pro tio ne sin rigardos plu ili kiel liajn disĉiplojn nek plu nomos lin majstro. Kaj la sekvan tagon, kiam la homoj estis suprenirintaj sur altan monteton kaj la tablojn starigintaj kaj volis sidigi Jozefeon sur la plej altan seĝon, tiam al tio kontraŭdiris la du fratoj, kaj tien sidiĝis sub ĉies vido unu el ambaŭ. Kaj nun okazis tia miraklo ke la tero englutis tiun kiu sur la seĝon estis sidiĝinta. Kaj tiu ĉi miraklo estis tuj konata tra tiu ĉi lando, sekve de kio la seĝo estis nomata la Timiga Seĝo. Tial poste ne estis iu tiel aŭdaca ke li kuraĝis tien sidiĝi, krom tiu kiun Nia Sinjoro tien elektis. »

\* Ne ekzakta citaĵo de la psalmaro de la reĝo Davido (133,2). Komparu kun la Zamenhofa traduko : *"Jen, kiel bone kaj ĉarme estas, se fratoj vivas kune !"*. Eble ĝi estas atesto de alia, ne konata varianto de la hebrea originalo, kiu tekstas : *"Hinneĥ mah-ttôv ŭmah-nnâ'im ŝevet 'ahîm gam-jâhad"* (laŭ la 7-a eld. de Kittel k Kahle, Stuttgart, 1968).

## Leteroj

Oostende, 27.03.1996

Kara Samideano,

Tute pravas S-ro Gunnar Gällmo ! Ankaŭ mi ne vidas kialon por artefarite konstrui iun praesperanton, kiam tiu lingvo, **por ni** arkaika, estis tutnormala lingvo por mezepokuloj.

Ankaŭ niaj franclingvaj lernantoj en mezgradaj lernejoj legas tiajn tekstojn en hodiaŭa franca.

Germain Pirlot (B)

Frankfurt, 17a de aprilo 1996

(...) Pri la sankta gralo – historio kiu interesas min ĉar mi vivis en katara lando, ne for de [ *erare !* ] supozata lasta estejo de ĝi : Montsegur – , mi samopinias kun G. Gällmo. Ĉar mi parolas la okcitanan al kiu la iama franca estis iom pli proksima ol la hodiaŭa, mi komprenas 80 % la originalon : ne sufiĉe por flua legado, kaj ankaŭ la traduko estis tro teda por kaptivigi min.

Daniel Pfeiffer (D)

*Respondeto* : Ni do submetiĝis al la volo de la legantoj, forigante ĉiun praesperantaĵon (sed konservante la stilon).

# La Serio pri Gilgameŝ

Ĉe la bordo de l'akvejo  
ili plu daŭrigis siajn karesadojn.  
(...)  
La hetajro, malfermante sian buŝon,  
ekparolis al Enkidu :  
" (...) Kial do, [Enkidu,]  
[ci ne sekvus min al Uruk ?] (?) "  
Post priparolado inter si pri tio  
(...),  
spontanee  
[li konsentis (?)] :  
ekkoninte sian koron  
(...),  
[li akceptis kion]  
Laĝojiga [petis kaj konsilis] !  
[Ŝi surmetis sur lin]  
unu (el) vestaĵo(j) siaj),  
[surmetante] la alian  
[sur sin].  
Lin preninte [je la mano]  
– [ambaŭ belaj] kiel dioj – ,  
[ŝi kondukis Enkiduon]  
al kabano de paŝtistoj.  
(... ?) Ĉirkaŭ li koruse  
la paŝtistoj  
spontanee  
[laŭdis lin, eksklamis (?)] :  
"(Tiu) ulo, kiom li similas  
al Gilgameŝ, laŭstature !  
[same] alta,  
imp[onega] kiel urbomura supro !  
Plej verŝajne jen Enkidu,  
la de[zert]-naskiĝintulo,  
[kies muskolaro] estas same fortikega  
kiel bloko el ĉielo ? "  
[Pa]non [al li] proponitan  
[li rifuzis (?)] ;  
[kaj bie]ron al li prezentitan  
[malakceptis (?)] ; \*  
[sen man]ĝi la panon,  
[li ĝin ekzamenis kun malfido] ;  
[sen trinki bieron],  
[li ĝin ekzamenis kun malfido].  
Ĉar Enkidu  
ja ne konis  
panon  
por sin nutri ;  
al biero  
ja trinkinda  
li ne ekalkutimiĝis.

La hetajro  
(do) malfermis sian buŝon  
kaj lin alparolis :  
" Manĝu panon,  
Enĉjo :  
tio estas bezonata  
por vivteni !  
Trinku iom da biero,  
tio estas la kutimo de la lando ! "  
Li do manĝis  
panon  
ĝis li tute satis ;  
kaj li trinkis  
iomege da biero :  
sep trinkpotojn !  
Li anime sentis sin kontenta  
kaj ravita,  
kun plezuro  
en la koro :  
(tiom ke) vizaĝo lia  
brilis.  
Li purigis  
akve  
sian korpon  
vilan  
kaj post kiam li sin ŝmiris  
per aromoleo  
li aspektis  
kiel homo !  
Per vestaĵ' li  
sin vestinte,  
ŝajnis  
(jusa) edziĝinto !  
Kaj li prenis  
klabon  
por batali  
kontraŭ la lionoj !  
[Li] la lupojn mor[te venkis],  
[superfortis la lionojn]  
[dum ripoz]is la paŝtistoj  
(...)  
[Ĉar (?)] Enkidu  
estis la paŝtisto de l' paŝtistoj !  
[Sed lin alparolis iam la hetajro :]  
" Ne restadu plu ĉi tie,  
[anstataŭe venu] al Uruk gregejoj-ĉirkaŭita  
(...)"

\* Aldono de la *Malnova versio* du versojn pli frue :  
"Nur la lakton de sovaĝaj bestoj li kutimis suĉi."

El la inter 250 kaj 300 versoj origine surskribitaj sur tiu ĉi *Dua Tabuleto* restas eĉ ne la triono. Ni plenis la mankojn per eltiraĵoj (en kursivoj) el la *Malnova* (aŭ *Babilonia*) *versio*, el antaŭmeze de la II-a jarmilo a.K.

# Religia vivo de japanoj :

Klarigante pri japanaj kulturaj valoroj kaj sociaj faktoroj (...) mi nepre devas pritrakti la ĝeneralan trajton de la religia vivo de japanoj, fakton kiu certe surprizas kaj iusence eĉ ŝokas la okcidentanojn, sed kies ekscio necesas por via pli bona kaj profunda kompreno.

Koncize dirite Japanio estas la unika lando en kiu ĉiuj religioj estas akceptataj kaj kunvivigataj. Mi citu jenan priskribon de germana protestanta misiisto, kiu vizitis Japanion antaŭ cent jaroj :

" *En Japanio troviĝas du religioj nomataj Ŝintoismo kaj Budhismo, kiuj en longa historia procezo influadis en multaj aspektoj unu al la alia. En la konscio de la popolanoj ambaŭ tre proksime rilatas kaj situas, tiel ke ili preĝas antaŭ hotoke de la budhisma idolo respektive kami de la ŝintoisma preĝobjekto, vizitante budhisman templon kaj ŝintoisman sanktejon sen iu stranga sento.*"<sup>2</sup>

Tio ĉi ŝajnas neimagebla kaj surpriziga por la okcidenta nocio aŭ normo pri religio. Sed por japanoj ĝenerale la religia praktiko povas esti ne tiel klare difinita kaj "afiksita" al la ĉiutaga vivo kiel por okcidentanoj. Mi nun prezentas al vi kelkajn ekzemplojn.

## Enigmo

Kiam vi demandas al japano kiun religion li kredas, vi ricevas tian respondon, ke li ne estas "afiksita" al iu specifa religio sed li ja vizitas diversajn religiajn instituciojn laŭ la okazo kaj bezono. Laŭ la statistiko en *Religia Almanako* prezentita de Kultura Ministerio de Japanio, la totala sumo de la membraro de ĉiuj registritaj religiaj organizaĵoj en Japanio nombras ĉirkaŭ du-cent du-dek milionojn. Mi aldonu ke tiu totala sumo dividiĝas inter cent-dek milionoj da membroj de ŝintoismaj organizaĵoj, naŭ milionoj sep-cent sep-dek mil, de budhismaj organizaĵoj, unu miliono kvin-cent mil, de kristanismaj organizaĵoj, plus fine dek milionoj ok-cent mil, de diverskategoriaj aliaj religiaj organizaĵoj.

Ĉu vi scias ke la totala nombro de la enloĝantaro de Japanio aktuale estas ĉirkaŭ cent du-dek milionoj ? Vi povas nun facile rimarki ke la suprecitita totala sumo de la membraro de religiaj organizaĵoj en Japanio superas tiun ĉi nombron da japana enloĝantaro je cent milionoj, ĉu ne ? Tio estas enigmo pri la religia vivo de japanoj.

1/ Preparita kiel teksto por prelego ĉe *Internacia Domo* en Londono (26-3-1996) kaj aldonu al eldonaĵo pri Japanio en la ĉeĥa, preparata de *Kava-Pech*.

## Kion tio signifas ?

La fakto estas ke unu japano ne apartenas al unu sola religia organizaĵo, sed registras sin en du-tri aliaj organizaĵoj, tre ofte en ŝintoaj kaj budhismaj. Pri kristana eklezio tiu duobla aŭ triobla aparteneco estas malofte permesata surbaze de la okcidenta nocio pri religio. Ĉiu unuopa organizaĵo, do, raportas al la Kultura Ministerio la suman nombron de sia membraro. La Ministerio simple sumigas ilin, tiel ke la totalo superas la aktualan nombron de japana enloĝantaro. Vi nun komprenas kial mi subtitoligis tiun ĉi artikoleon per "Mikspoto", ĉu ne ?

## Ekzemploj

Nun mi montros al vi aliajn ekzemplojn de la harmonia kunekzistado de diversoriginaj religioj en Japanio. Kiam la nova bebo alvenas al familio, cent tagojn post la naskiĝo, kutime, la geavoj kaj gepatroj kune portas la novnaskiton al loka ŝintoa sanktejo por peti la benon de ties vivo. Tiu bebo kreskas kaj en la knabeco aliĝas en diversaj festoj, ritoj, servoj kaj ceremonioj okazantaj en la lokaj ŝintoaj sanktejoj kaj budhismaj temploj.

Ofte la familio sendas sian infanon al la infanvartejo kaj antaŭlernejo administrata de religiaj organizaĵoj kaj tiam ankaŭ la gepatroj ne demandas pri la religia kategorio de tiu varteja administranto, sed gravigas tion ke ĝi troviĝas proksime de ilia hejmo kaj kiom bone kaj kontente ĝi prizorgas kaj klerigas ilian infanon senkonsidere pri lia hejma religia aparteno. Miakaze, miaj gepatroj sendis min al antaŭlernejo administrata de katolika eklezio, malgraŭ tio ke mia hejma religio tiam estis budhisma. Mi do ricevis iom da katolikisma eduko tie sub la gvidado de pastroj kaj monakinoj.

## Geedziĝo

Se temas pri geedziĝa ceremonio, ŝintoa sanktejo estas uzata sed pli populare kristanisman preĝejon volonte elektas japanaj gefianĉoj kiel ejon de sia geedziĝa ceremonio, malgraŭ tio ke ili ne estas kristanoj. Ofte japanaj gejunuloj grupe aŭ individue vojaĝas eksterlanden por okazigi sian nupton en kristana preĝejo kaj por samtempe ĝui la mielvojaĝon. Ĉu vi povus imagi kiel aspektas la grupa vojaĝo de dekoj da tiaj gefianĉoj, kiuj estas kondukataj de turismaj gvidantoj ?

2/ *El Japana Socio en Meiji-Erao observata de germana misiisto*, de C. Munzinger.



# Mikspoto kaj paradizo de religioj <sup>1</sup>

Por diri la veron mia propra filo ankaŭ volis okazigi sian geedzan feston eksterlande kaj elektis la Urbodomon de Prago en Ĉeĥio, kie okazis lastan jaron la oficiala ceremonio por li kaj la fianĉino, aranĝita laŭ la civila kodo de la urbo Prago. Liakaze la religia ligiteco ne estis bezonata kaj la nova paro plene ĝuis la ekzotisman dank'al la helpo de mia bona amiko en Prago.

La budhisma templo estas konsiderata kiel ejo de funebra ceremonio kaj memorservo por la familiaj prauloj ofte senkonsidere pri la religia aparteno de la forpasintoj. *O-bon*, aŭ la budhisma ulambano por memorigi la praulojn, estas vaste plenumata en la lando, aŭ en la mezo de julio aŭ en la mezo de aŭgusto, depende de la lokaj tradiciaj cirkonstancoj, tiel ke la japanaj kompanioj permesas pri speciala ferio dum *O-bon*-tagoj, senkonsidere pri la religia aparteno de unuopaj dungitoj. Dum tiu feria semajno la fervojoj kaj ŝoseoj en la lando estas plenplenaj de dekoj da milionoj da veturantoj.

Por koncizigi la suprajn priskribojn de la religia vivo de japanoj mi povas diri ke japanoj ĝenerale naskiĝas kaj kreskas kiel ŝintoistoj, geedziĝas kiel kristanoj, kaj mortas kiel budhistoj.

**Ŝintoismo** estas la japana indiĝena religio kaj japanoj importis budhismon en la 6-a jarcento tra Ĉinio kaj Koreio. Jezuitoj alportis kristanisman al Japanio en la 16-a jarcento. Intertempe taoismo kaj konfuceanismo ankaŭ estis transplantitaj en Japanion. Aliaj religiaj formoj ne trovis malfacilaĵon simile establiĝi en Japanio. Tiamaniere, ĉiuj religioj kunekzistadas kaj kunvivadas en Japanio, kiun mi volas nomi "Paradizo de Religioj".

Nu, tia kompleksa kaj sinkretisma aspekto de la religia vivo de japanoj influas tiel al la komuna regularo kiel al la komerca praktikado. Kiam vi vizitas grandan kompanion kiel ekzemple la ĉefan fabrikan por elektronikaj aparatoj de Panasonic, vi certe admiras la purajn kaj bonordajn ekipojn kun aŭtomatigitaj kaj robotitaj fabriklinioj internaj kaj eksteraj. Vi tamen trovas en la korto de la modernigita fabriko la ŝintoan sanktejon kvazaŭ gardanĝela kapelo staranta en la okcidentaj vilaĝoj.

Tiaj sanktejoj estas vaste observataj en centoj da kompanioj grandaj kaj malgrandaj en Japanio. Sur la supro de ĉielskrapulaj modernaj bildingoj en Tokio kaj aliaj urbegoj en Japanio, kaj en la angulo de la ekzekutivaj salonoj, vi trovas tian kapelaspektan ŝintoan sanktejon speciale apoteozitan por la kompania prospero.

Tiaj enkompaniaj sanktejoj estas konsiderataj kiel grava parto de la kompania aktivado. Okazas regulaj ceremonioj kaj festoj en kiuj kvalifikitaj ŝintoaj pastroj estas invitataj por plenumi la formalajn ritojn, kaj ĉiuj membroj de la kompanio estas petataj partopreni.

Por japanoj, religioj estas ligitaj al siaj ĉiutagaĵoj simile kiel komuna regularo. En la **novjara tago**, ekzemple, averaĝe ok-dek milionoj da japanoj vizitas iujn ajn religiajn instituciojn, plejmulte ŝintoajn sanktejojn kaj budhismajn templojn. Tio ĉi estas unu el la rutinaĵoj por celebri la novan jaron. Ne estas necese ke ni kunligu tion al la religia servo aŭ praktiko en la okcidenta nocio pri religio. Pro tio, kiel mi jam prezentis al vi komence, japanoj ofte respondas negative aŭ neklare al la demando, kiun religioj ili kredas, ne konsiderante sian ligitecon kun sanktejoj, temploj kaj preĝejoj, kiujn ili ofte vizitas, kiel aparte grava religikreda konduto.

Ŝintoismo daŭre havas sian lokon en la ĉiutaga vivado de japanoj, kiuj volonte alfiksis al siaj aŭtomobiloj la ŝintoan amuleton por protekto kontraŭ eventuala akcidento. En la japanaj hejmoj vi povas trovi kunekzistadon de ŝintoa altaro kaj budhisma simbolo en la sama ĉambro.

Kristanaj preĝejoj estas ofte plenaj de studentoj pri la Biblio, kvankam ili ne estas baptitaj kristanoj; kaj lingvaj kursoj gvidataj de kristanaj pastroj kaj pastoroj kun diversaj naciecoj allogas multajn japanajn gejunulojn kaj tio ofte kondukas al ilia elekto de kristana preĝejo kiel nupta ejo. Kiel mi citis antaŭe la membraro de kristanaj eklezioj en Japanio nombras malplej multe inter la religiaj apartenoj de japanoj, okupante nur 1,25 % el la japana loĝantaro, sed iliaj influoj inter la japanoj estas sufiĉe gravaj.

Ankoraŭ abundas la ekzemploj por montri kiel religioj kun diversaj originoj kaj kategorioj harmonie establiĝas en Japanio, sed la supraj jam sufiĉas por via kompreno, mi pensas.

Mi **konkludas** ke por japanoj ĝenerale religio funkcias tiel proksime kaj nesenteble ĉirkaŭ ili kvazaŭ aero kaj akvo<sup>3</sup>, kiuj nepre ne mankeblas por nia ĉiutaga vivo, kaj tiel, kontraste kun la okcidentanoj, japanoj ne pridemandas ian specifan "afiksadon" al religioj. Ili akceptis kaj klopodis kompreni la diferencon inter diversoriginaj religioj kaj trovis la eblecon de ilia kunekzistado kaj kunvivado.

**Yoshimi UMEMA**

3/ *Fiŝoj vivas en akvo kaj ne konscias pri tio. Homoj vivas en la regno de Tao kaj ne scias tion.* (Ĉuang-cu)

# Nathan Söderblom

**Antaŭ 130 jaroj naskiĝis** en Svedio Nathan Söderblom (1866-1931), homo grava en la kristana eklezio kaj samtempe kun escepta signifo por la teologia scienco (precipe la **religi-historio**).

Lia patro devenis el sveda bienula familio, lia patrino el intelekta dana rondo. Dum lia infanaĝo kaj juneco, la ĉirkaŭaĵo plenis je severa simpleco kaj religia fervoro. Tial Nathan finis la mezlernejon estante pozitiva "luterana" kaj malalt-eklezie edukita junulo.

Inter 1883 kaj 1894 li studis en Uppsala. Tiu studotempo montriĝis riĉa kaj diferenca. Li aktive partoprenis la kluban vivon : same en religiaj kaj en studentaj kluboj li aktivis. Interalie li estis la unua redaktoro de periodaĵo eldonita de la ĵus starigita *Studenta Misia Societo* en 1884. Reprezentante la svedajn studentojn, li partoprenis la studentan konferencon en Northfield, Usono (1890). El tio probable kreskis lia **ekumena perspektivo**. Krom tiaj aktivecoj, li ankaŭ faris brilajn studojn. En 1886 li trapasis filozofian ekzamenon (kun specialiĝo en la klasikaj kaj orientaj lingvoj), kaj en 1892 la teologian ekzamenon. Ekde tiam li decidis specialiĝi en religi-historio, kaj komencis la studadon de persaj religioj.

## Pastro de la sveda eklezio

Intertempe li pastrigis. Sian pastran laboron li komencis kiel pastoro en la psikiatra instituto en Ulleraken. Poste, kun sia edzino Anna Forselle (ili geedziĝis en 1894), li translokiĝis al **Parizo**, kien li estis sendita. Tie li spertis diversajn malfacilaĵojn. Unue, estis granda diferenco inter sveda paroĥo kaj lia pariza komunumo. Plie, ekzistis ankaŭ granda diverseco inter la skandinavoj mem kiuj loĝis en Parizo. Lia laboro tie konsistis precipe el socia helpo. Ankaŭ dum tiu ĉi periodo li daŭrigis la studadon, i.a. ĉe *La Sorbonne* kaj aliaj institutoj. Tie plifortiĝis lia konvinko pri konstruado de **teologio** kiu samtempe estu **kristane teologia kaj science humanisma**.

En 1901 li iĝis universitata **profesoro** en Uppsala. Li "alportis novan sonon" je formo kaj enhavo en la universitaton. Samtempe li ankaŭ laboris en la *Helga Trefaldighets*-komunumo. Lia pastorejo estis malfermita al ĉiu el liaj studentoj kaj amikoj.

La sveda eklezio kaj ĝia problemaro ankaŭ interesis Nathan-on ; precipe pere de lia membreco en la katedrala kanonikaro de la diocezo Uppsala.

Dek jarojn post sia enoficigo ĉe la universitato de Uppsala, li iĝis profesoro pri religi-historio kaj direktoro de la religi-historia seminario en Leipzig. Li samtempe konservis sian postenon en Uppsala. En majo 1914 li estis elektata de la registaro Hammarskjöld kiel **ĉefepiskopo**. Nathan Söderblom estis rigardata kiel unika persono en la sveda eklezia historio. Sur ĉiu tereno de la eklezia vivo li renovige laboris kaj metis la eklezion mezen de la vivo, mezen de la problemoj de la mondo.

Lia **ekumena strebado** famigis lin en la tuta mondo. Li ekigis la kunlaboradon inter la sveda ŝtat-eklezio kaj la tiel nomata "*frikirkliga*" (malaltaj eklezioj) ; kaj inter ĉiuj "ne-romaj" eklezioj de la mondo. **Li forpasis en julio 1931** pro malfortigita koro. Li estas entombigita en la katedralo de Uppsala.

## Lia verko

La laboro de Nathan Söderblom estis ampleksa ; li servis kaj la eklezion kaj la sciencon. Lia idealo estis la konstruado de teologio kiu formu **sintezon inter la kredo kaj la scienco**.

Kiel teologo kaj episkopo li emfazis renovigon de la teologio kaj de la kultura vivo. Söderblom kuraĝis ekiri al tute nova "alpaŝo" kiu **finis longan tradicion de absolutaj veroj**, kaj kiu inaŭguris novan periodon kies centra punkto estis la relativeco-teorio.

La plej gravaj argumentoj por konstrua dialogo inter la kompara religio kaj la eklezia teologio por li estis :

- la neceso de **historia studo** por retrovi kaj identigi la bazon de kristanismo (kies daŭrigo estis devo por Nathan Söderblom) ;
- la neceso uzi la rezultojn de **kompara religio-studo** por la taskoj de la misio ;
- la ebleco de **valortaksado de la religioj** surbaze de kompara alpaŝo, kaj la ebleco de scienca bazo por la unika pozicio de kristanismo.

En la persona sinteno de Söderblom koncerne la historian kaj kritikan studon de la biblio, la emfazo ŝanĝiĝis de la aktualaj vortoj de la Skribo al la revelacio koncentrita ĉirkaŭ la figuro de Kristo, kaj de kelkaj donitaj dogmoj al la ideo de Dio kiu daŭre riveligis en la historio.

Lia opinio pri la Skribo kaj lia intereso pri kompara religio kondukis lin al la studado de la ekesto kaj kresko de unuflanke kristanismo kaj aliflanke la biblio, kaj al esploro de la rolo de certaj bibliaj tekstoj kiel personaj konfesoj.

Ankaŭ sur la eklezia tereno situas lia laboro kiel (neoficiala) prezidanto de la "Konsilio de la misioj" de la sveda eklezio. Liaj ideoj pri misio baziĝis sur lia interpreto de la religi-historio. Tiel li ne plu uzis la evoluan koncepton koncerne la diversajn religiajn tradiciojn, sed li klasifikis tri ĉef-tipojn de religioj unu apud la aliaj.

La eklezia misio estis por Söderblom precipe la atesto, fronte al la adeptoj de ĉiuj tradicioj, ke "Dio vivas", kaj ke tio kion ili spertis en la propra tradicio, atingis la plej altan signifon en Jesuo Kristo. Li ankaŭ emfazis la rajton pri sendependeco de la novaj misiaj eklezioj, kaj ilian rajton kompreni kristanismon laŭ la propra opinio kaj laŭ la propra sento tiel kiel ĝi plej taŭgas en ilia situacio.

Kiel aŭtoritato en neŭtrala lando, en 1917 Söderblom klopodis kunvoki internacian konferencon, celante montri la spiritan unuecon inter la protestantoj de la militantaj landoj. Li ne sukcesis, sed tamen el tio li ekhavis valorajn kontaktojn, helpe de kiuj **li ekigis la ekumenan movadon**. Ties fonda kunveno okazis dum granda konferenco en Stockholm en 1925. Reprezentantoj el preskaŭ ĉiuj protestantaj kaj ortodoksaj eklezioj ĉeestis, escepte de la rom-katolika.

Lia laboro inter la militistoj dum la 1-a mondmilito kaj liaj streboj al unueco inter la kristanoj estis la precipaj kialoj por la atribuo de la **Nobel-premio de la Paco**, kiun li ricevis en 1930.

En siaj religi-historiaj skribaĵoj Nathan Söderblom klopodis i.a. priskribi la fenomenon *religio*. Por difini la esencon de la religio, li uzis i.a. la jenajn nociojn: sankteco, dio, kulto, revelacio kaj personeco. Precipe la koncepto *sankteco* gravas, ĉar ĝi montras diferencon inter la sankta kaj la profana. La konceptojn *revelacio* kaj *personeco* Söderblom uzis por difini la sanktan rilaton inter la homo kaj la dieco. Laŭ Söderblom ĉiun religion apogas revelacio, ĉar **ĉiu religio havas "supernaturan" devenon**. Kaj tiu dia mistero riveligis al la homa personeco.

### Klasifiko de la religioj

Söderblom klasifikis la diversajn religiojn unu apud la aliaj kaj ne kiel kutime en evolua sinsekvo. Li dividis la religiojn en tri grupojn: popolreligio, senfineco-mistiko kaj profeta revelacio-religio. Ĉe **popolreligiojn** li klasifikis la religiojn de la primitivaj popoloj, la ĝermanan religion, la japanan ŝintoismon, la ĉinan kaj la romanon religion kaj multajn religi-formojn el Hindio kaj Antaŭ-Azio. Sub la **senfineco-mistikon** li metis

precipe la hinduan kaj la grekan religiojn, kiuj ankoraŭ postvivas en la mistiko de kristanismo kaj de islamo. Söderblom rigardis budhismon kiel kulminon de la senfineco-mistiko. Karakteriza por la profeta **revelacio-religio** estas la religio de Israelo, islamo, zoroastrismo, la opinioj de Sokrato kaj Lao tze, la *bhakti*-religio kaj finfine kristanismo kiel kulmino.

Plie, Söderblom diferencigis la ĝeneralan kaj la specifan revelaciojn. Kiel ĝeneralan revelacion li rigardis la sinkonigon de la supernatura, kiun oni retrovas en ĉiuj religioj. La specifa revelacio estas specifa por la tipo de revelacio-religio. Tiu ĉi specifa revelacio diferencas de la senfineco-mistiko. Kristanismo estas speciala religi-historia tipo kun specifa formo de revelacio. **La teologie grava demando pri la rilato inter kristanismo kaj nekristanaj religioj tamen ankaŭ ĉe Söderblom restis nerispondita.**

### Konkludo

Nathan Söderblom faris sian historian kritikan laboron kiel religi-historiisto kaj religi-psikologo, sed kun multege da kompreno por la misteraj profundecoj de la religio kaj por la rekta sav-signifo en la klasikaj kaj neanstataŭigeblaj principoj de kristanismo. Ĉiam li metis sin sub la gvidadon de la ekleziaj patroj (precipe Lutero), kvankam la **universala kulturo de humanismo inspiris lian sciencan laboron**.

Tiel Söderblom reprezentis universale direktitan teologion, kun evangelia-katolika karaktero, nome la svedan teologion. En ĝia etoso Söderblom laboris, al ĝia evoluo li dediĉis siajn fortojn.

Sekve ĝi atestas pri intima kunesto de la pozitiveco de la "malnova" kaj la radikaleco de la "nova" teologio, al kiu strebis Söderblom.

### Bibliografio

*Nathan Söderblom: leven en denken van een godsdiensthistoricus*, J.M. van Veen, Amsterdam, 1940.

Mircea Eliade

*Classical approaches to the study of religion*, J. Waardenburg, 1973

*Nathan Söderblom and his contribution to the study of religion*, ed. Eric Sharpe and A. Hultgard, Uppsala, 1984

*Geschiedenis van het protestantisme*, J. Baubérot, Doetinchem, 1990.

**Lydia Kerremans\***

\* Studo verkita por *Faculteit voor Vergelijkende Godsdienstwetenschappen*, la Fakultato pri Komparaj Religi-sciencoj (FVG) en Antverpeno. (Pri ĝi vidu en *Asistilo* n-roj 4 p. 58 kaj 16 p. 3).

Pri tiu romano Istvan Ertl, redaktoro de *Esperanto*, diris ke li konsideras ĝin unu el la kvin plej valoraj romanoj en esperanto, kune kun *Kiel akvo de l'rivero*, *Vojaĝo al Kazohinio*, *La Litomeŝla tombejo* kaj *Ombro sur interna pejzaĝo*.

Ĝi fajne respegulas la socian vivon en Hungario antaŭ kelkaj jardekoj, kaj la freŝe naivecajn reagojn de infano. La stilo originalas per intermeto de poemetoj kaj uzo de lertaj kunmetitaĵoj.

Por legantoj de *Asistilo* mi speciale insistu pri la intrigo, kiun konsistigas interna rilato de la rakontanto al katolikismo : ĉe la infano reliefiĝas la elita fiereco aparteni al kuraĝe kristana familio kaj la pia deziro plaĉi al la Kristo sed baldaŭ venas la instruoj pri peko, kaj la konstantaj suferoj de tro skrupulema knabo obsedita per la demando pri sia kulpeco : aferoj tiel simplaj kiel penso pri la instruistina korpo aŭ iro al la lernejo en ne perfekta sana stato naskas ĉe la infano la timon ke li grave pekis, ĉar la pastro asertas ke malĉastaj pensoj estas grava peko, kaj same opinias la patrino pri la ago malutili al sia propra sano...

Kiel fuĝi la timon de la infero ? Nur persvadante sin mem ke oni faris tion nevole, sed ĉu vere nevole ? Ĝisfreneze obseda fariĝas la demando. Fine la konfeso de la pekoj al la pastro alportas liberiĝon ...sed kion fari se tuj poste oni malfeliĉe refalas en malbonan agon aŭ penson ?

Post tiu junadoleska periodo venas la duboj pri la pastraj instruadoj, kaj sub influo de komunistaj kunstudentoj aŭ kunarmeanoj, aperas fortiĝanta inklino al ateisma pensmaniero. Originalas la lastaj linioj, en kiuj la rakontanto malkovras la **ambiguecon de homo, kies racio sincere neas Dion dum koro sentas** nevideblan kareson de iu mistera amo junaĝe spertita. **François Degoul**

Budapest : Oy Mendoservo Ak (SF) kaj Hungara Esperanto-Asocio, 1987, 248 p., 18 gld, ISBN 96 3571 172

### Mallongege

**"Religio kaj esperanto"** estis la temo de la 27-a Korea E-Kongreso, kiu okazis en okt. 1995 ĉe la universitato *Wonkwang* (kun 295 partoprenintoj).

La 40.000 Kievaj islamanoj baldaŭ havos moskeon.

Tajvano inaŭguros en jan. 2000 la unuan **Muzeon de la religioj**. Iniciatita de budhista majstro Ŝin-Tao la projekto celas antaŭenigi interreligian fratecon.

**"Multaj opinias ke malfacilas kompreni aliajn religiojn, civilizaciojn kaj pensmanierojn. Tamen temas pri neceseco en hodiaŭa mondo: Popoloj ne havas alian elekton ol sin kompreni."** Hamdi Al-Zaqzuq, egipta ministro pri religiaj posedaĵoj (el *Al-Ahram*).

## Kelkaj kritikaj notoj pri Bruno Gröning

### Kiu estis Bruno Gröning ?

B. Gröning naskiĝis en 1906 en Danzig. En 1946 li venis, estinte laboristo kaj soldato, al okcidenta Germanio. Li profesie malsukcesis ; malsukcesis ankaŭ provo teatri kun aliaj laikaj aktoroj. En 1947 mortis lia 9-jara filo, lia alia filo jam mortis en 1940. En 1948 li komencis **"sanigi per spiritaj fortoj"**. Li famiĝis per la **"sanigo" de knabo kiu suferis muskloŝrumpon**. La kuracistoj ne trovis pliboniĝon de la sanstato, sed la gepatroj donacis al Gröning sian tutan posedaĵon kaj iĝis "adeptoj" de B. Gröning. **La knabo poste mortis 16-jara, pro sia malsano.**

En majo 1949 la registaro de Nordrejn-Vestfalio (parto de Germanio) sentis sin devigata malpermesi publikajn eventojn de B. Gröning. Kun aro da adeptoj, sekretarioj kaj funkciuloj, li do tramigris Germanion. Estiĝis subtenantoj kaj amikaroj.

En 1954 Gröning estas akuzata antaŭ tribunalo pro krimo kontraŭ la leĝo pri kuracado, kaj pro vundigo. Li ne plu rajtas kuracumi. En 1958 li estas akuzata kaj kondamnata ĉar li kulpis pri la morto de pulmmalsana knabino : li aranĝis ke ŝi ne ricevis profesian kuracistan terapion. Li estas punata per monpuno kaj minaco de malliberigo. En 1959 Bruno Gröning mortas en Parizo, 53-jara, pro kol-kancero.

### Ideologio

Gröning asertis ke la nura kredo sufiĉas por saniĝi. Li mem estis la **peranto aŭ kanalo de la dia saniga radio**, li estis "sendita de dio". La adeptoj traktis lin kiel mesion. B. Gröning malakceptis pruvi siajn "fortojn" pere de sciencistoj. Malsanoj estas laŭ Gröning-instruo **"laboraĵo de la diablo"**. Se oni volas saniĝi aŭ resti ŝana, tiam nepras regula partopreno en la amikaj rondoj. Pri konfliktoj aŭ malsanoj oni tie parolu. Tiel la adeptoj fuĝas el la socio al la savanta Gröning-amikaro. Oni eĉ asertas ke la fortoj de B. Gröning helpis trovi laboron aŭ pli bonan kreskon de ĉambra planto.

### Organizo de la amikaroj

La Gröning-amikaroj estas gvidataj de Grete Hüsler. La grupoj (en D, A, CH, F, Usono) regule kunvenas ; tie la partoprenantoj raportas pri siaj spertoj. La grupoj estas fermitaj. Estiĝas forta konscio pri eliteco, kaj malamikaj bildoj kontraŭ kritikantoj kaj alipensantoj. Pri la "vero" ili ne emas diskuti en la grupo. Homoj estas kutime alparolataj kiam ili suferas pro malsano korpa aŭ psika.

Iom longa grupaneco sekvigas malligiĝon kun la mondo kaj perdon de jam ekzistantaj sociaj rilatoj.

Fakte, kredo pri saniĝo subtenas saniĝon. Sed danĝeras kiam **necesa kuracista helpo estas malpermesata.**

Pro la supre priskribita karaktero de la Gröning-amikaro mi forte konsilis al la UEA-komitato ne akcepti la kunlaboron kun ĝi. **Z. M. Sikosek\***

\* Laŭ informoj de la katolika episkopa oficejo en Essen.

## Leteroj

Mi ĝojas ke vi daŭre aperigas *Asistilon* en bona kvalito. Ĝi estas pli enhavoriĉa ol *Dia Regno*, pli vigla ol *Espero Katolika* kaj **simile interesa kiel mia ĝis nun plej ŝatata** religia Esperanto-gazeto *Dio benu*, de la ĉeĥa sekcio de IKUE.

Neckarhausen, 06.04.1995

En la n-ro 16 plej plaĉis al mi via recenzo de la nova traduko de la evangelioj. Estas strange ke mi ankoraŭ preskaŭ nenion aŭdis pri tiuj kajeroj, kaj ke UEA ĝis nun ne aperigis vian recenzon. Nu, UEA sufiĉe ofte informas pri gravaj eldonaĵoj nur kun kelka malfruo (...) Fine mi volas informi vin ke nun mi decidis aboni *Asistilon* (...)

Amike **Ulrich Matthias** (Germanio)

Milano, la 28an de nov. 1995

Mi havas la grandan plezuron komuniki al vi ke nia lasta laboro *La Lernejo de Spiriteco\** estas finita (...) Temas pri ekstreme grava traktaĵo unika en sia fako (...) Ni decidis fari tion ĉar ni opinias ke tiuj kiuj konscias la problemon de la lingvo universala kaj ne formetas la eblon de la veroserĉado, havas nivelon de konscienco kaj sentemeco tiajn, ke ili povas dece kompreni la signifon kaj valoron de tiel altaj kaj maloftaj instruoj (...)

Do *Homo-Centro*, daŭrigante sian klopodadon por la disvastigado kaj persona **realigado de la altgaj principoj kaj spertoj** asertitaj de ĉiuj supergaj Majstroj de la Spirito, intencas tiel regali sian esperantistan amikaron per plia rimarkinda faritaĵo, ankoraŭ pli lumiga ol la antaŭaj\*\*, kaj kies apartan valoron kaj unikecon oni ne povas sufiĉe emfazi pervorte (...)


Se vi volas fari demandojn, se vi bezonas klarigojn aŭ konsilojn, disponu pri ni laŭ via plena diskrecio : tre volonte ni faros ĉion kion ni povos.

Dezirante al vi ĉion bonan kaj multan lumon.

**Enrico Marzola** (Italio)

\* De Pier Franco Marcenaro, 27 A4-paĝoj, 1995, 1-a eld. en esperanto laŭ la 3-a de la originale itala (1991). Havebla de E.M., Viale F. Crispi 3, I-20121 Milano.

\*\* *La Lumo kiu brilegas en ĉiu homo*, parolado de P.F. Marcenaro ĉe la Palaco de Kongresoj en Barcelono okaze de la V-a Tutmonda Konferenco por la Unueco de la Homo (1978). *La unueco de la homo, Majstroj el okcidento kaj el oriento : sperto-identeco*, parolado de P.F. Marcenaro en Munkeno (Bavario), 5-9-1981, 6 p. kun "citaĵoj el Majstro Eckhardt, Henriko Susone, Johano Tauler, Johano el Ruysbroeck, Guru Nanak, Guru Arĝun..." ; kaj *Povo de Dio, povo de Majstro*, de Sant Kirpal Singh ("Prezidanto dum 17 jaroj de la Tutmonda Interfratiĝo de Religioj, al kiu aliĝas pli ol 250 religiaj organizoj"), majo 1995, 11 p.



Feng Run, 95-12-02

Kara Amiko,

Mi ricevis vian organon en kiu troviĝas mia artikolo pri *Granda Unueca Kredo*.

**Vere , mi revas fariĝi konstruanto de paco, kaj briko de Asistilo.**

(...) Mi nur esperas ke vi en ĉiu numero publikigu mian adreson kaj mian foton. Jen mia adreso : Zhai Yuzhong, Xi Yang Jia Ying Xue Xiao, 064009 He Bei, Ĉinio.

El fora Oriento mi atendas vian respondon.

Via amike

**Jebumo** (Ĉinio)

La 15-an de junio 1996a

En la revuo *Asistilo* n-ro 13 aperis dum la jaro 1993a tre interesa artikolo titolita *Kiel islamano kredas je Allah* verkita de Muhammad Kahraman. Nia eta grupo de katolikaj esperantistoj freŝdate studis la tekston, kaj alte ŝatis la fidon kaj malkaŝemon de tiu estimata turka islamano, kaj petas ke estu aperigota la sekvo. Nia grupo unuanime malakordas kun la opinio de samideano Don Harlow. Efektive, ne temas pri "antaŭenigi la islamanojn" sed temas pri informo pri islamanoj kaj islamano religio, kaj pro tio "unu vorto ne sufiĉas".

Esperante ke la redakcio atentos nian peton, ni anticipe dankas. Kun samideanaj salutoj,

**Jean Bertrand** (Francio)

*Responde* : Mi provos, en venonta n-ro, se mi retrovos ĝin!

Jerusalem, 1996-7-3

Venontan jaron UEA kongresos an Aŭstralio kaj eble ne tiel multe da homoj iros tien. Se vi volus pripensi Israelon kaj Jerusalemon por la jara seminario kaj kunveno por tiu jaro 1997 mi povus aranĝi tion. Do **Centro Sivron oficiale invitas vin veni kaj kongresi en Israelo.**

Eblas aranĝi tre malmultekostan (sed iom primitivan) restadon, meznivelan kaj en komercaj kunvenejoj kaj kongres-hoteloj – kiel vi preferus. Mi provas ankaŭ aranĝi kelkajn prelegojn pri judismo kaj pri Jerusalemo, kaj kelkajn pliajn tempojn por la grupo se tio estas dezirata. Esperantan ĉiĉeronadon mi mem faras.

Elkore salutas

**Jeremi Gishron**

*Responde*

Konsentite, se vi volas respondeci pri la tuta organizado. Mi mem tute ne certas ĉu mi povus veni. Interesiĝantoj bonvolu rekte rilati kun li ĉe : Centro Sivron, Box 231 80, IL-91 231 Jerusalem.

# מרכז סברון

## CENTRO SIVRON

### مرکز سقرون



ת"ד 23180 Box

Jerusalem 231-9111

ירושלים القدس ISRAEL

Tel: 972-(0)2-86 6249

Ekzistas konata talmuda diraĵo kiu diras ke "ĉiuj profetoj profetas nur pri la venonta mondo". Sed la homaro neniel evoluas rekte kaj senprobleme. Ne nur tro akre argumentas la homoj per siaj vortoj kaj lingvoj partoprenante en la dialoge semantika evoluo, sed ankaŭ kaŝita kaj malkaŝita perforto ĉiam kunestas, kaj multaj diversaj trikoj kaj artifikoj estas elpensitaj de la homoj. La malfacilecon starigi tute justa mondo estas trafe priskribita en la Midraŝo klarigante kelkajn vortojn de Abrahamo al Dio: "Ĉu vi volas teni la ŝnuron per ambaŭ ekstreĵoj!? Ĉu eble vi celas ambaŭ la mondon kaj vere striktan juĝon!? Se vi ne indulge cedas iomete la mondo neniel povas ekzisti!" [Vajikra Rabba 10:1] Mi trovis en eseo de Rabeno Abraham Jichak Hakohen Kook belan priskribon de la homa evoluo. La nomo de tiu eseo estas "Lumfragmentoj - vidpunkto pri la kialoj de la ordonoj". Ĝi komencas kun prezento de Majmonido. La ekzistenskialo de ĉiu ordono estis laŭ Majmonido la elradikigo de herezo kaj idoladorado. Rabeno Kook sekve spinas sian vortfadenon tiel:

"Kiam spirita fenomeno renkontas alian spiritan fenomenon kiu estas ĝia [natural] kontraŭo, se ĝi deflankiĝas por eviti frotiĝon, ĝi deve estas vundita kaj malfortigita, eĉ se ĝi sukcesas gardi sian originan karakteron kaj obstine daŭrigas. Sed se ĝi respondas ELHAKANTE NOVAN VOJON sub la influo de la kontraŭa principo kaj [eĉ] kun ĝia helpo, tiam oni atingas novan kaj pli altan staton, plena de freŝa triumfo en ĝia celo kaj esenco".

Kio estas necesa laŭ Rabeno Kook estas "la kunigo de ĉiuj idealistaj fortoj, kiuj nun funkcias izolitaj, enteksante ilin en unu granda ĉiuamplaksa unuo."

**Jeremi Gishron**

La MONDO estas plena de lingvoj kaj religioj. La lingvoj kaj la religioj formas kulturojn kaj la kulturoj la civilizaciojn kaj la civilizacioj la MONDON. Ŝajnas ke ni ĉiuj scias ielsence kio estas lingvo sed la aliajn "esencojn" estas TRE CERTE multe malpli facile difini.

Certa fluo en la religia sfero okupigas sin pri la "ELprovo kaj EKtrovo" de la internaj rilatoj ene de tiuj homaj sferoj. Vere ĉiu ORIGINA religio estas UNUMENSA (ne *uni-versa* ĉar tio ja signifas laŭvorte *unu-lingva*, do mi devas korekti tiun vorton!) entenante ĉion en si mem, sed tamen nia RACIO pike konigas nin pri la ekzisto de aliaj UNUMENSOJ - aliaj religiaj "mondoj".

Nia (kaj tiu estas *REGA* pluralo) tasko estas EL&EKe apliki nian internacian lingvon por forĝi ĉiujn necezajn kaj bezonatajn novajn signifojn por nia bluverda hejmoplanedo, kiujn la post-industria periodo postulas, ĝis kiam oni povas paroli pri eĉ "interreligia" lingvo (eble la lingvo *sivronit*?)

Zamenhof profunde konciis ke ĉiuj "variacioj" en religia kredo devos esti pontigitaj, same kiel la abundego de lingvoj signifus tian problemon ke ĝi estus (pacige) solvebla nur per vera kaj honesta Ponto-Lingvo, internacia en sia interna strukturo. La laboro sur la religia tereno li tamen postlasis al estontaj generacioj ĝis la gordia nodo foje estos pace MALLIGITA.

Jen Dio montris al mi vojon, jam kiel tre juna homo, kiel ĉiuj religioj povus esti lokigitaj en la reto de la sola VORTODIO:  
- jen unuaflanke DIO ESTAS VORTO (ortodokseco),  
- kaj jen aliaflanke (estas) la VORTO kiu ESTAS DIO (mistikeco). Simpligante la aferojn oni iel povas kuraĝe proklami ke alia(j) religio(j) kvazaŭ ne povas ekzisti (KROM la granda plimulto jam inkluditaj kaj ligitaj per IA profunda logiko). Inter tiuj du polusoj la homa medito- kaj penso-kapablo vigle osciladas kaj turne alternas sen iu ebleco rompi la bazan kradon.

LOKO estas NOMO de Dio (HaMakom). En la Torao estas skribita kiel Majmeo (J-ve) foje elektos Jerusalemo por sia altaro. Tio signifus en nia moderna "komplika mondo" ke oni FIRME evitu ĉian mallokigon de la "Nunaj Sanktaj Stonoj" kaj ĉiujn ŝanĝojn de la "Nuntempaj Sanktaĵoj", kaj anstataŭe difinu novan "MAKOM", novan *hejmon* (por la templo) ĉe la pereferio de LA MODERNA urbo - ĉar ekde la tempo de Davido ĝis hodiaŭ - ni EGE KRESIKS dumtempe. Eĉ en religio ni devas antaŭeniri - sed nur laŭ la bona vojo, la vojo kiu plaĉas al Dio kaj al la Homaro samtempe. (sic!)

## Nuntempaj spiritaj mesaĝoj

« Ne ĉiu kiu diras al mi "Sinjoro, Sinjoro"  
eniros en la regnon de la ĉielo,  
sed tiu kiu plenumas la volon  
de mia Patro kiu estas en la ĉielo. »

(Mateo 7,21)

Tiu frazo de Jesuo instruas al ni ke pli ol preĝo gravas ago. Tamen ankaŭ preĝo multe valoras, laŭ la evangelioj. Sed kiel rilatas preĝo kaj ago? Ilia ligo neniam aperis al mi tiel forte kiel en la jena frazo (en kiu la vorto "Mi" signifas Dion):

**"Preĝi estas laŭtlegi Mian parolon por efektiviĝi ĝin"**<sup>1</sup>

Samspirite, al la tradicia formo de la preĝo *Patro nia*: **"plenumiĝu Via volo"**<sup>2</sup>, mi preferas la Aresan: **"ke ni faru Vian volon"**<sup>3</sup>. Vi, leganto, ĉu vi konservis miajn antaŭajn artikolojn? Se jes, relegante la p. 31 de *Asistilo* n-ro 15, vi ĝuos pli precizan komprenon.

Ĉiuokaze, la proponita difino de *preĝo* ŝajnas forgesi ekzemple laŭdan kaj petan preĝojn. Fakte, nur ŝajne; se mi eldiras laŭdan aŭ petan psalmon de David, tiu Biblia elparolado en iu senco efektivigas per si mem la Dian volon, ĉar Biblio mem alvokas al laŭdo<sup>4</sup> kaj peto<sup>5</sup>.

Tamen la proponita difino **"laŭtlegi Mian Parolon por efektiviĝi ĝin"** subkomprenigas ke laŭdo kaj peto konsistigas nur margenajn formojn de preĝo, tial ke la Dia Parolo alvokas ĉefe al **agnosko de la ununura Dio per ama kaj justa konduto**. Dio do ne tiom deziras niajn laŭdojn aŭ petojn, kiom nian bonan konduton.

Tial en la iom nebula koncepto de **"Dia Parolo"** unuarangas, almenaŭ por Judoj, la Leĝo: **ĝin elparolante oni enkorigas kaj kvazaŭ nature aplikas ĝin**. Al tio strebas ĉe la Judoj la tage dufoja recitado de **"Ŝma' Isrâ'el..."**<sup>6</sup>.

Mia ĉiutaga elparolo de Biblio kaj Korano instigus min pli detale esprimi tiun sperton. En la venonta numero ni provos orientiĝi en du nebulaj kampoj: kion fari kiam eroj Bibliaj aŭ Koranaj naskas ĉe mi **dubojn pri sia Dia origino** (kio ofte okazas); kaj ĉu vere frazoj kiel **"Mi estas la Eternulo"**<sup>7</sup> povas efektiviĝi per laŭtlegado?

(sekvote)

**François Degoul**

1 / L'Évangile donné à Arès 35,6

2 / Mateo 6,10

3 / L'Évangile donné à Arès 12,4

4 / Psalmaro 50,14

5 / Mateo 7,7-11 kaj 21,22; Luko 18,1-7

6 / Readmono 6,4-9

7 / Eliro 6,2 ktp.

(Pagita anonco)

### (Interŝanĝaj anoncoj)

LA JAPANA BUDHANO  
N-ro 288 JULIO-AŬGUSTO 1996

#### ENHAVO

卷頭言	石黒 漢子	1
Doŭgen parolis jene (8)	Okcidento	2
Alvoko de TANGSHAN-a Esperanto Asocio		9
本の紹介『慈光こぼれ話』	加藤 教順	10
お手紙から		11
ソフィーの世界を読んで	西 泰弘	11
中国佛跡巡拝記(2)	佐村 隆英	12
本誌の作成について(4)	編集者	18
国宝の十一面観音菩薩めぐり	船崎 明雄	19
仏教用語のイタリヤ訳について(1)	西 泰弘	22
勝鬘教Granda Parolado de Srimalo	Izutani Kon'an	24
ASISTILO		28
目次, El Redakcio		29

目次

### La Kosmologio de Martinus

Logika vivklarigo kiu kondukas al pozitiva vivsinteno - kaj al pacaj kaj harmoniaj rilatoj inter homoj. Legu pri la kosmologio en la nova revuo KOSMOS.

Petu senkoston provokzempleron ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 96, DK-2000 Kopenhago F, Danio. ☎ +45 3834 6280 - Fakso +45 3834 6180

Nenia unuigo aŭ membreco

### La Kancerkliniko

Politika, Kultura,  
Skandalema, Ajnista

**"La mondo ŝanceliĝas,  
Nia Kliniko plu staras"**

5 numeroj jare  
125 FF / 42 gld\*

Direktoro kaj Redaktoro: **Jacques Le Puil**  
"Les Cocherats", F-18210 Thaumiers, Francio  
(pĉk Paris 12 729 73 X (aŭ UEA-konto klik-g))

(\* 25 gld por malpli riĉaj landoj...)



# Internacia Konvencio pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj : Ĝenerala komentario de la Homrajta Komitato (sekvo)



6. La Komitato havas la opinion ke la art. 18 (4) **permesas** en publika lernejo la instruadon de fakoj kiaj la ĝenerala **historio de religioj** kaj etikoj, se ĝi estas farata laŭ neŭtrala kaj objektiva maniero. La libereco de la gepatroj aŭ kuratoroj, zorgi ke iliaj infanoj ricevu religian kaj moralan edukon konforman al iliaj propraj konvinkoj, formulita en la art. 18 (4), rilatas al la garantioj pri la libereco instrui religion aŭ kredon deklarita en la art. 18 (1). La *Komitato* atentigas ke publika edukado kiu enkluzivas instruadon pri aparta religio aŭ kredo estas kontraŭa al la art. 18 (4) krom se dispozicio estas farita por nediskriminaciaj esceptadoj aŭ alternativaj eblecoj kiuj estas konformaj al la deziroj de la gepatroj kaj kuratoroj.

7. Laŭ la art. 20, neniu manifestado de religioj aŭ kredoj rajtas egali *propagandon por milito aŭ alvoko al nacia, rasa aŭ religia malamo, kio konsistigas instigon al diskriminacio, malamikeco aŭ perforto*. Kiel deklarite de la *Komitato* en ties *Ĝenerala komentario* n-ro 11 (19), la subskribintaj Ŝtatoj estas devigataj proklami leĝojn por malpermesi tiajn agojn.

8. La art. 18 (3) permesas restriktajn de la libereco manifesti religion aŭ kredon nur se la limigoj estas *preskribitaj per leĝo kaj estas necesaj por protekti la publikajn sekurecon, ordon, sanon aŭ moralon, aŭ la fundamentajn rajtojn kaj liberecojn de aliaj*. **La rajto esti libera de premado havi aŭ adopti religion** aŭ kredon, kaj la libereco de la gepatroj kaj kuratoroj, zorgi pri religia kaj morala edukado, ne povas esti restriktitaj. Interpretante la kampon de la permeseblaj limigklausuroj, la subskribintaj Ŝtatoj devus deiri de la bezono protekti la rajtojn garantiitajn de la *Konvencio*, inkluzive la rajton pri egaleco kaj nediskriminacio sur ĉiuj terenoj specifitaj en la art. 2\*, 3 kaj 26. Truditaj limigoj devas esti enkondukitaj per leĝo kaj devas ne esti aplikataj laŭ maniero kiu atencus la rajtojn garantiitajn en la art. 18. La *Komitato* opinias ke la art. 18, paragr. 3, estas strikte interpretenda : restriktaj ne estas permesitaj pro kialoj ne specifitaj tie, eĉ se ili estus permesitaj kiel restriktaj al aliaj rajtoj protektitaj en la *Konvencio*, tiaj kiaj nacia sekureco. Limigoj rajtas esti preskribitaj nur por tiuj celoj por kiuj ili estis preskribitaj, kaj devas esti rekte rilataj kaj proporciaj al la specifa bezono kiu necesigas ilin. Restriktaj ne rajtas esti trudataj por diskriminaciaj celoj aŭ aplikataj laŭ diskriminacia maniero. La *Komitato* opinias ke la koncepto *moralo* devenas de multaj sociaj, filozofiaj kaj religiaj tradicioj ; konsekvence limigoj de la libereco manifesti religion aŭ kredon cele al la **protekto de moralo devas baziĝi sur principoj ne devenantaj ekskluzive el ununura tradicio**. Homoj jam submetitaj al certaj laŭleĝaj trudoj, tiaj kiaj **prizonuloj, daŭrigas ĝui siajn rajtojn manifesti sian religion**

aŭ kredon ĝis la plej alta grado akordigebla kun la specifa naturo de la trudo. Raportoj de la subskribintaj Ŝtatoj devus doni informon pri la kompletaj kampoj kaj efikoj de la limigoj entenitaj en la art. 18 (3), ambaŭ en kio koncernas la leĝojn kaj ilian aplikadon en specifaj cirkonstancoj.

9. La fakto ke religio estas agnoskita kiel ŝtata religio, aŭ ke ĝi estas starigita kiel oficiala aŭ tradicia, aŭ ke ĝiaj fideluloj inkluzivas la majoritaton de la loĝantaro, ne devas havi kiel rezulton ian difekton de la ĝuo de kiu ajn el la rajtoj entenitaj en la *Konvencio*, inkluzive de la art. 18 kaj 27, aŭ ian diskriminacion kontraŭ **la anoj de aliaj religioj aŭ la nekredantoj**. Aparte, certaj diskriminaciaj dispozicioj kontraŭ tiuj ĉi, tiaj kiaj dispozicioj restriktantaj la elektelecon por registara servo al membroj de la reganta religio, aŭ donantaj ekonomiajn privilegiojn al ili, aŭ trudantaj specialajn restriktajn en la praktikado de aliaj kredoj, ne estas en akordo kun la malpermeso de diskriminacio bazita sur religio aŭ kredo kaj la garantio de egala protektado entenita en la art. 26.

La dispozicioj antaŭviditaj de la art. 20, par. 2, de la *Konvencio*, konsistigas gravajn preventilojn kontraŭ atencoj de la rajtoj de religiaj minoritatoj kaj de aliaj religiaj grupoj ĝui la rajtojn garantiitajn de la art. 18 kaj 27, kaj kontraŭ agoj de perforto kaj persekutado direktitaj al tiu grupoj. La *Komitato* deziras esti informita pri la dispozicioj faritaj de la koncernitaj subskribintaj Ŝtatoj por protekti la praktikadojn de ĉiuj religioj aŭ kredoj kontraŭ atencoj, kaj protekti iliajn fidelulojn kontraŭ diskriminacio. Simile, informo rilata al la respekto por la rajtoj de religiaj minoritatoj, entenitaj en la art. 27, estas necesaj por ke la *Komitato* povu taksu ĝis kiu grado la libereco de opinio, konscienco, religio kaj kredo estis plenumata de la subskribintaj Ŝtatoj. La koncernitaj subskribintaj Ŝtatoj ankaŭ devus inkludigi en siajn raportojn informon rilatan al la agoj kiujn iliaj leĝoj kaj jurisprudenco rigardas puneblaj kiel blasfemajn.

10. **Se aro de kredoj estas traktita kiel oficiala ideologio** en konstitucioj, proklamoj de la regantaj partioj, ktp., aŭ en fakta praktikado, tio devas ne havi kiel rezulton ian difekton de la liberecoj entenitaj en la art. 18, aŭ de iuj aliaj rekonitaj de la *Konvencio*, nek ian diskriminacion kontraŭ homoj kiuj ne akceptas la oficialan ideologion aŭ kiuj oponas ĝin.

\* Art. 2 (1) : "Ĉiu Ŝtato subskribinta tiun ĉi *Konvencion* sin devontigas respekti kaj certigi al ĉiuj individuoj ene de sia teritorio kaj submetitaj al ĝia jurisdikcio, la rajtojn rekonitajn en tiu ĉi *Konvencio*, sen ia **distingo**, kia **pro** raso, haŭtkoloro, sekso, **lingvo**, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia origino, posedaĵo, naskiĝo aŭ aliaj statusoj.